



Bulteno de la Nordfrancia Esperanto-Federacio – Fondita en 1908



La Vorto de la Prezidanto

2012: ESPERANTO 125-JARA

„Ni festos la jubileon per amasa partopreno en la kongreso, organizata de nia Norda Federacio, kiu okazos en Wavrans-sur-Ternoise la 15-an de Aprilo 2012. Tiun tagon ni ankaŭ solene honoros la memoron de Émile GROSJEAN-MAUPIN, ĉe lia savita kaj novigita tombo en la apuda vilaĝo HERNICOURT. Mi dankas ĉiujn inter vi, kiuj per mondonacoj kontribuis al la savo de tiu grava kultura heredaĵo, kiun ni enlistigos en la oficialan dokumenton pri la Zamenhof-Esperanto-Objektoj (ZEO-i) en la mondo. Apartan dankon al Nicole BÉCANT kaj Jacky RAMON, kiuj multe laboras por organizi la kongreson.

La kampanjo “L’ESPÉRANTO AU BAC” estas sukcesa, jam 16 000 subskriboj, ni daŭrigu la kolektaĵon. Ĝi estas bonega ilo por informi pri nia lingvo. Certe pluraj inter la subskribintoj interesiĝos pri la lingvo kaj decidus lerni ĝin. Tio ne estas utopia revo! La dudeko da junuloj, kiuj ĉi jare partoprenis nian sukcesan 23-an Eŭropan Rendevuon en Stella-Plage, bonege parolas kaj utiligas Esperanton, kiun ili lernis perrete. Pri tiu evento kaj pri la lasta vizito de la Aŭstralia verkisto Trevor STEELE en nia regiono, vi povas

Sekvo p. 2 . . .

23-a Eŭropa Rendevuo

Brilanta suno en lazura ĉielo biluminis “Stella Maris”, kiam alvenis la 116 partoprenantoj al la 23a Eŭropa Rendevuo en “Stella Plage”, la 12an kaj 13an de Novembro 2011.

La afbla akcepto de Arlette kaj Edmond PLUTNIAK, ĉiam bonhumoraj kaj entuziasmaj, tuj varmigis la etoson, dum la alvenantoj sentis sin en konata, kvazaŭ familia loko.

Post ricevo de persona ŝlosilo, ĉiu malkovris la modernan kaj komfortan dormĉambrom dulitan kun tualetto-ĉambreto sendifekta. Dum la staĝanoj frandis kafon, Arlette klarigis la disvolviĝon de la semajnfino kaj prezentis la gvidantojn de la diversaj kursoj: Katalin KOVÁTS por la komencantoj kaj la instruantoj; Sylvain LELARGE por la progresantoj unu; Renée TRIOLLE por la progresantoj du; Kristin TYTGAT por la preparado al la eŭropaj referencadraj ekzamenoj; Anne JAUSIONS por la preparado al la franca triagrada ekzameno.

Tuj, ekis la kursoj en studema kaj simpatia etoso por la kursanoj kiuj venis el 12 landoj: Belgio, Brazilo, Britio, Ĉinio, Francio, Nederlando, Hungario, Pollando, Portugalio, Rusio, Ukrainio kaj Svedio.

La vespermanĝo kunigis ĉiujn en



Organizantoj, kursgvidintoj kaj prelegintoj ricevas el la manoj de Martin florojn.

granda manĝejo kun gigantaj aperturoj, por gustumi delicajn mitulojn...

Georgo HANDZLIK prezentis teatraĵon de li verkitan pri la vivo de Zamenhof, kiun li majstre korpigis dum pli ol unu horo kaj duono. Li ricevis varmajn aplaŭdojn.

Post amika diskutado ĉirkaŭ glaso da trinkajo, ĉiu bone dormis en tre komforta lito.

Dum la rendevuo, la partoprenantoj povis viziti ekspozicion “Esperantistoj estas Artistoj” en kiu Lili GILOTEAUX, Francine LONGUE-EPÉE, Joëlle MULLER kaj Alain CHALM prezentis kelkajn el siaj belaj verkoj.

Dimanĉon matene, okazis la dua parto de la kursoj.

Poste, iuj iris viziti la urbon “Le Touquet”, aliaj vizitis la salonon de la libroj, aliaj iris promeni sur la strando de Stella Plage, aliaj ĉestis la meson celebratan de Pastro

legi en la sekvantaj paĝoj.

Post pluraj jaroj da laboro kiel redakciestro de nia bulteno, Katja **BOEN** volis iom senŝarĝiĝi kaj transdoni la postenon. Ni dankas al ŝi pro la bonega laboro plenumita kaj bonvenigas Claude **LONGUE-EPÉE**, kiu akceptis plu porti la torĉon. Katja ne forlasas nin, ŝi restas en nia skipo kiu ricevas la helpo kaj la profesian sperton de Cyrille **DÉCOUTURE**.

Kiam vi legos tiun bultenon, mi flugos al Ĉinio kun Edmond kaj Thérèse **DEQUIDT** al la *Esperanto-insulo* por 5-semajna restado. Ni multe fotos kaj pretos plene rakonti al vi tiun eksterordinaran aventuron dum nia Federacia kongreso en *Wavrans-sur-Ternoise*, do plenigu la aliĝilon kaj sendu ĝin tuj por ne forgesi kaj faciligi la pezan laboron de la organizantoj.

Bonan jaron 2012 al ĉiuj! //

Arlette Plutniak



ENHAVO

ASOCIAJ TEMOJ

ArE ★ 23-a Eŭropa Rendevuo	p1
ArE ★ Trevor Steele en Araso	p2
ArE ★ Vivanta estajo faritas el memor-heredaĵo	p3
ArE ★ Vizito de Araso kun Trevor STEELE	p3
ArE ★ Agad-raporto el Araso	p5
BoE ★ Kunvenoj...	p5
Eo80 ★ Kun Ĉi fortas Ni!	p5
Eo80 ★ Anonco pri E-kursoj en gimnazio	p6
DuE ★ Saluton el Libera Duno	p6
DuE ★ Agad-raporto el Dunkirko	p7
LVE ★ Metropolo-novajoj	
LVE ★ La vizito kaj prelego de Trevor Steele en Lille	p8
LVE ★ Agad-raporto el LVE	p10
VaE ★ Agad-raporto el Valenciennes	p10

Benoît **ENTE** en la apuda kapelo. Dume, kelkaj restis en la akceptejoj, kie ili havis la grandan plezuron aŭskulti kaj aplaŭdi la mirindan kaj improvizitan koncerton de *Georgo HANDZLIK*. Li kantis pli ol 20 kanzonojn de li verkitaĵoj, akompanante sin per gitaro. Ekstaza kaj escepta momento. Kia artisto!

Post la komuna tagmanĝo, *Katalin KOVÁTS* prelegis pri *Tiberio MORARIU* kaj lia filino, "*Stelsemantoj en la ora nordo*", tiel kompetente kaj tiel pasie, ke la aŭskultantojn ŝi ravis. Denove, *Georgo HANDZLIK* kantis. Varmajn aplaŭdojn ricevis ŝi kaj li. Bedaŭrinde, jam estis la fino de la tago. Ĉiuj disiĝis, senpacience atendante la 24an estontan Eŭropan Rendevuon, kiu okazos samloke la 17 kaj 18ajn de Novembro 2012. La "**Solidareca kaso**", provizita de la

vendo de la belaj poŝtkartoj ilustritaj de *Francine LONGUE-EPÉE*, ebligis la ĉeeston de tri nepagipovaj samideanoj. Preskaŭ 200 subskriboj estis kolektitaj en la urbo kaj en la feriejo por subteni la peticion "*L'espéranto au bac*". *Chantal WŁODARSKI*, kiu kolektis la plej grandan nombron da subskriboj, gajnis belan diplomon de "**Stelsemanto**" kaj la lastan libron de *Katalin KOVÁTS* kiu havas la saman titolon.

Dankon al ĉiuj kiuj partoprenis kaj ebligis la grandan sukceson de tiu evento: *Arlette, Edmond*, la kursgvidantoj, la prelegantoj, la artisto kaj ĉiuj amikoj el Esperantujo, kiuj venis en Stella Maris.

Richard VALET

El Araso

Trevor Steele en Araso



Ĉeestantaro en Araso. Staras *Jacky RAMON* prezidanto de *Arras-Esperanto*.

La 14-an de Oktobro je la 18a20, ĵus enirinte en la Kulturejan Oficejon de Araso, mi aliris la grupeton da Esperantistoj kaj demandis, ĉu *Trevor STEELE* jam alvenis.

– Jen, li staras du metrojn antaŭi vi! respondis *Jacky Ramon*, prezidanto de nia klubo.

– Sed laŭ la foto, kiun mi vidis ĉi-matene en iu retpaĝo, li estas proksimume 45-jara, ĉu ne?

– Aŭskultu: mi certigas al vi, ke la vigla kaj afablega 71-jarulo, kiu vizitis la urbon (kaj trinkis bieron) kun ni ĉi-posttagmeze, ja estas la verkisto, kiu nun prelegos por ni!

Dum ni atendis kelkajn malfruiĝintojn, mi decidis kontroli, ĉu la preleganto vere estas la aŭtoro de "*Flugi kun kakatuoj*". Do mi starigis tiklan demandon pri preciza punkto

de la romano. Baldaŭ evidentiĝis, ke li ne nur legis, sed tre verŝajne ankaŭ verkis ĝin, ĉar lia respondo estis kaj klara kaj detalega. Tial ni ne bezonis peti lian pasporton.



Trevor STEELE kun *Arlette PLUTNIAK*

Ĉar la antaŭan tagon en Lille li jam prelegis pri aborigenoj, *Trevor STEELE* provis ĉi-foje interesigi nin pri alia romano, sed ni firme revenigis lin al la oficiale anoncita temo. Li parolis tiel klare, ke iu ĉeestanto, kiu eklernis Esperanton antaŭ apenaŭ ses monatoj, poste asertis al mi, ke li komprenis preskaŭ ĉion! La prelego ja estis tre interesa, interalie pro amuza anekdot-o pri la tago, en kiu la verkisto preskaŭ perdis la vivon pro neintenca "krokodilado" en Aŭstralia rivereto.

Jean HENNEBERT

El Araso

Vivanta estaĵo faritas el memor-heredaĵo

Tial esperantistoj rememorigas kaj honoras siajn pionirojn

Kiu estis Émile Grosjean-Maupin?

Émile **GROSJEAN-MAUPIN** estis unu el la pioniroj de la Movado. Li naskiĝis en Nancy la 19-an de Februaro 1863 de svisaj gepatroj. Lerta lernanto de “*École Normale Supérieure*”, agregaciulo pri gramatiko, li fariĝis universitata profesoro en Parizo. Kiam li estis 43-jara, li esperantistiĝis kaj, de tiam, li sin dediĉis al Esperanto. Li redaktis artikolojn, verkis librojn kun diversaj aŭtoroj. (vidu sur la retejo).

Lia ĉefa verko estas vortaro (Esperanto-Franca) aperigita en 1910 kaj (Franca-Esperanto) en 1913. Lia Plena Vortaro (1930) estos reeldonata de SAT-Amikaro.

En Parizo, li konatiĝis kun la familio **LABATTEUX**, devena de *Hernicourt*. Kiam ili emeritiĝis, ili revenis en *Hernicourt Saint-Martin*, en la neordinara domo “*Le colombier*”, kie **GROSJEAN-MAUPIN** mortis en 1933. Restas nur unu persono, en la vilaĝo, kiu eble povus rememori pri li. Ni esperas renkonti lin en la venontaj monatoj. Kelkaj personoj eklernis Esperanton, en la vilaĝo, supozeble, dank’al nia fama vortaristo. Ni esperas trovi ankaŭ iliajn posteulojn.

En 2009, oni informis nin, ke la senzorgata tombo de Émile **GROSJEAN-MAUPIN** estos deprenita,

ke liaj restaĵoj estos forĵetitaj en la komunan ostepojn. Tiam membroj de *Arras-Esperanto* serĉis kaj trovis la tombejon, kontaktis la estron de la vilaĝo, S-ron **BOITEL**. Tiu ĉi konfirmis, ke restas tri jaroj antaŭ la detruo de la tombo, en kiu kun Émile **GROSJEAN-MAUPIN** ripozas ankaŭ liaj amikoj, membroj de la familio **LABATTEUX**. Ni daŭre serĉas posteulojn.

Arlette kaj *Edmond PLUTNIAK* raportis pri tiu afero en *Sète* dum la ĉijara interasocia kongreso. Multaj personoj apogis la iniciaton restarigi la tombon kaj proponis la organizon de monokolekto. Ni jam ricevis mondonacojn de individuoj kaj asocioj, tamen la sumo ankoraŭ ne atingas la prezproponojn de la du kontaktitaj marmoristoj. Do la monokolekto daŭras. Ni baldaŭ publikigos la liston de la donacintoj, kiujn ni varmkore dankas. Tiu renovigita tombo estos *Zamenhof Esperanto Objekto* (ZEO). Okaze de ĝia inaŭguro, la Norda Federacio decidis aranĝi sian jaran kongreson kun la helpo de *Arras-Esperanto*, en *Wavrans-sur-Ternoise*, apuda vilaĝo de *Hernicourt*.

Tiu kongreso estos unika okazo konatigi nian lingvon en la ĉirkaŭaĵo. Ni renkontis la instruistinojn de la vilaĝo, kiu favore akceptis nian proponon prezenti Esperanton al ĵaj

gelnantoj. Ni kontaktis la lernejspektoron kaj ni renkontis la vilaĝestron de *Framecourt*, prezidanton de la asocio “*Sillons de culture*” kiu grupigas 20 vilaĝojn. Li proponas, ke ni faru prelegon pri Esperanto en Marto 2012. Ankaŭ S-ro *Georges DEBRET*, eks-“*conseiller général*” kaj membro de “*Rotary-Club*” favoras la organizon de prelego; eble li eĉ iom helpas finance. Ni baldaŭ kontaktos du lokajn historiistojn: S-ino **ACQUAERT** kaj S-ro **JESSENNE**. La multnombraj preparlaboroj de la kongreso bone antaŭen iras.

Nicole **BÉCANT**

Monkontribuo per ĉeko aŭ ĝiro al: **Fédération Espéranto-Nord Lille 0051715G026**

La eksterlandanoj per sia banko ĉe la konto **IBAN: FR58 2004 1010 0500 5171 5G02 625**

BIC: PSSTFRPPLIL

Menciinte dorse de via ĉeko: “Por la savo de la tombo de *Grosjean MAUPIN*”.

AL NIA KASISTO: Xavier VILAIN

Résidence L’Alcyon – Apt. 41
90 rue du Maréchal Joffre
59240 Dunkerque

El Araso

Vizito de Araso kun Trevor STEELE

La 14-an de Oktobro 2011 rendevuis ses geklubanoj antaŭ la Arasa Kultur-oficejo, komence de la posttagmezo. Trevor **STEELE** alvenis kun *Michel DECHY* kaj *Claude LONGUE-ÉPÉE*. Post la prezentadoj, ni direktiĝis al la kretmino *Wellington*.

Temas pri subtera sito, kie, en la unua mondmilito, pli ol dudek mil britaj soldatoj kantonmentis dudek metrojn subgrunde, dum ok tagoj antaŭ

la terura ofensivo de la 9-a de Aprilo 1917. Surface estas nun ĝardeno, kaj ankaŭ memormuro starigita honore al la britaj regimentoj, kiuj partoprenis la Arasan batalon.

Ni unue spektis filmon pri la batalo. Poste, kun ĉiĉerono, ni ĝuis dum 75 minutoj la aŭdgvizitan viziton tra tiuj iamaj mezepokaj kretminoj, kiujn la laborego de Nov-Zelandaj tunelistoj interkomunikigis en 1917. Laŭ sin-

sekvo de dudeko da komentariaj haltoj, ni spektis filmarkivojn, malkovris objektojn (kruĉetojn, ladskatolojn, kaskojn, ktp.), ŝtuparojn tajlitajn en la kreto, virinan korpon gravuritan en la ŝtono, bareliefan vizaĝon, kaj ankaŭ altaran krucon, antaŭ kiu preĝis soldatoj antaŭ la ekstermo.

Poste ni resupreniris al la akcepthalo, kie ni malkovris ekspozicion pri fotoj, poŝtaĵoj, uniformoj, kaj diversaj

posedaĵoj de la soldatoj, retrovitaj en la subterajo.

Tio estis tre emociplena vizito, kaj tiam mi pensis, ke eble, je nia nivelo, per la kono de tia komuna lingvo, kia Esperanto, kiu malfremdigas homojn, ni agadas pacocele, kaj ke tiu komuna lingvo iam povus eviti tiajn konfliktojn.

Forlasinte la minejon, ni piediris tra la Arasaj placoj. Sur la Granda Placo, nia klubanino *Joëlle MULLER* ĉiĉeronis, klarigante apartajn detalojn de la Arasa arkitekturo. Ni plu konversaciis

sur la Placo de la Herooj, ĉe trinkeja teraso, frandante jen teon jen bieron.

Poste ni eniris la halon de la Turisma Oficejo, kaj ankaŭ la salonon *Robespierre*, por instigi niajn gastejojn admiri la arkitekturan stilon kaj la ravajn lignotegaĵojn de tiuj belaj ĉambregoj.

Trairinte la Teatran Placon, ni iris ĝis la domo de Robespierre, bedaŭrinde fermita, antaŭ ol repaŝi laŭ la Arasaj stratetoj al la katedralo Sankta-Vaast, kaj jam al la Kulturoficejo por tuj

pretigi la ĉambron, en kiu *Trevor STEELE* estis prelegonta.

Estis tiom pli da vidindaĵoj, kiujn ni dezirus montri al li! Ni ja bezonus pli longan tempon... Eble okaze de lia venonta vizito?

Hélène MAZZEGA verkis raporton, *Chantal WLODARSKI, Nicole BÉCANT* kaj *Arlette PLUTNIAK* aldonis informojn, *Jean HENNEBERT* perfidete provis esperantigi...

El Araso Agad-raporto el Araso

ek1 La 3-an de Oktobro 2011 re-komenciĝis en Araso niaj ĉiulundaj Esperanto-kursoj. Partoprenas tre regule dek sep geklubanoj gvidataj de *Arlette* kaj *Edmond PLUTNIAK*, kiuj instruas pere de la aŭdvida metodo "Pasporto al la tuta mondo". Ĉiuj laboras en la sama grupo, kie kunestas spertuloj, progresantoj, komencintoj, kaj eĉ unu juna komencanto. Fakte, tiu ĉi ankaŭ lernas mem per la retejo *lernu.net*, celante atingi baldaŭ nivelon sufiĉan por bone profiti de la aŭdvida metodo.

"Pasporto al la tuta mondo" estas sufiĉe fleksebla, do eblas adapti ties diversajn ekzercojn al diversnivelaĵ lernantoj. Krome, danke al la finlaboraĵo de siaj studoj en la Poznana universitato, kiu konsistis en esplorado de la Esperanta kultura fono en tiu ĉi metodo, *Edmond* sukcesas transdoni al niaj lernantoj valorajn informojn pri la Esperantaj movado, kulturo, literaturo, ktp.

ek1 Ĉiusemajne mi plu elturniĝas por instrui Esperanton en la M.J.C. de *Noeux-les-Mines*: unu mardon el du venas nur komencantoj, kaj ĉiun vendredon okazas kurso por ĉiuj lernantoj. Ĉi-jare mia plej juna lernanto estas 7-jara, kaj la malplej juna ne emeritiĝos antaŭ dek jaroj...

ek1 La 14-an de Oktobro *Trevor STEELE* alvenis Arasen, kaj kun grupo da lokaj esperantistoj vizitis interalie la kretminon "Wellington", kiu fariĝis grava memorloko de la unua mondmilito. Aparte kortuŝis lin, ekscii, ke en la jaroj 1916-a kaj 1917-a kvarcent kvindek Nov-Zelandaj tunelistoj aktivege laboris por interkomunikigi la diversajn subgrundajn galeriojn, el kiuj dudek mil britaj soldatoj subite eliĝis en Aprilo 1917 por kontraŭataki la germanan armeon. Post tiu vizito, la verkisto prelegis en la urba Kulturoficejo. Kompreneble okazis poste komuna vespermanĝo en restoracio.

La viziton kaj la prelegon rakontas du apartaj artikoletoj en tiu ĉi gazeto.

ek1 La 12-an kaj 13-an de Novembro, naŭ el niaj geklubanoj partoprenis la Eŭropan Rendevuon en Stella. En la hejpmateno de nia retejo www.arras.esperanto-nord.org troviĝas ligiloj al multaj fotoj pri la evento.

Post la renkontiĝo, unu el la komencantoj decidis frekventi niajn kursojn en Araso.

Krome, *Arlette* kaj *Edmond PLUTNIAK* gastigis dum du pliaj tagoj nian polan amikon *Georgo HANDZLIK*.

ek1 La 14-an de Novembro, *Georgo* animis nian kurson. Vigla babil-



Georgo "Bardo sen Barbo" HANDZLIK

rondo ebligis pli bonan interkonatiĝon. Li parolis pri sia esperantista vivo, kaj instruis al ni kelkajn el siaj kantoj. En agrabla etoso ni kantis (preskaŭ) kune, antaŭ ol kune vespermanĝi en restoracio.

ek1 La 19-an de Decembro je la 18-a horo okazos la ĝenerala kunveno de nia asocio. Se ĉiuj anoj jam pagis sian kotizon, ni eble povos trinki iom da akvo post la laboro...

ek1 Krom se okazus ĝenerala bank-rotto de ĉiuj Eŭropaj bankoj kaj ŝtatoj, via kamentubo verŝajne ricevus la viziton de Julpaĉjo (aŭ eble de Avo Frosto) en la nokto inter la 24-a kaj la 25-a de Decembro. Bonvolu do estingi la fajron sufiĉe frue. Dankon por li (aŭ eble por li)!

Raportas *Jean HENNEBERT*

El Amieno (Esperanto 80) "Kun Ci fortas Ni!"



Kun ili pli fortaj ni estas !!!!

La prezidanta flanko

Kelkaj inter vi, kiuj scias pri muziko en Esperanto, tuj rekonas la vortojn de la refreno, kiujn kriadis **JoMo** en sia kanto "Kun ci" aperinta en la albumo "JoMo kaj la Liberecanoj" fine de la 20-a jarcento.

Tiu refreno, por mi, estas kiel deklamo, kiue de longtempe min sekvas kiel moto de mia esperantisteco.

Esperanto estas afero kultura, kiue staras nur sur volo de homoj, kiue uzas kaj defendas ĝin. Estas ĉiama laboro informi homojn, ilin varbi...

Farita laboro povas facile esti de la tempo malfarita. Venko sur iu flanko povas okazi dum samtempa malvenko sur alia flanko. Sen esperantistoj, Esperanto ne plu kapablus sin teni kaj plu vivi. Pro tio ni devas esti kunigintaj kaj senĉese labori ĉar, kiel tion verkis **ZAMENHOF**, "Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan".

Dum la Kongreso de la Federacio en **Oignies** en la jaro 2006, **Claude LONGUE-ÉPÉE** parolis al mi, instigante min al aliĝo de **Esperanto 80** al la Federacio. Li argumentis, ke la "Norda Federacio" sen **Pikardio** ne estas "tuta tuto", (pri tio mi pripensis, kaj nun mi pensas, ke neniu parto de la Francia teritorio estu sen-esperantista).

Esperanto 80 ja neniam estis membro-asocio de la Federacio.

Tio estis decidita en 2004. Tamen, post jaroj, eble ni pripensu kaj rekonideru denove la situacion. Tio klare estis la pozicio de la membroj, el kiuj kelkaj pensis tion tre gravindan evoluigon.

La membrara flanko

Dum la lasta kunsido, la membroj de "Esperanto 80" (la Amiena asocio) decidis pridiskuti la eblecon aliĝi aŭ ne aliĝi al la Norda Federacio.

Estis longa atendo de la federacianoj, kiuj plurfoje petis Amienanojn tion fari, sed en 2004 per interna referendumo ni voĉdonis kontraŭe.



Afiŝoj kreitaj okaze de la veno de Trevor STEELE en Amienon

Tempo pasis. Riveroj sub pontoj fluis. Renkontiĝoj disvolviĝis. Alproksimiĝoj okazis. Nermalbona etoso fariĝis pli varma.

Esperantio estas granda familio.

Do kial plu resti izolitaj?

Dum tiu kunsido, estis debato. Estis prezento de la avantaĝoj kaj malavantaĝoj de aliĝo de **Esperanto 80** al la Federacio.

Mi provis resti kiel eble plej neŭtrala, ĉar, kvankam mi havis propran vidpunkton pri la aliĝo, kiel demokrato, mi ne deziris, ke iu sekvu la prezidantan pozicion pro tio, ke mi estas **LA** prezidanto. Tio estu pure persona sinteno de membroj.

La diskutpunktoj estis iel "Ĉu vere malpli da libereco?", "Ĉu vere la elspezoj estos multe pli altaj?", "Ĉu ni devus iri plurfoje jare al Lille aŭ Araso?" ttp.

Estis finfine baloto

La rezulto estis vere mirinda: la membraro kiel **UNU** voĉdonis jese al la demando pri aliĝo de **Esperanto 80** al la Federacio.



Esperanto 80

La logotipo de Esperanto 80

Tio signifas, ke ekde tiu momento la membroj sentas sin membroj de unu loka, kaj plie, de unu pli granda ankoraŭ pli kuniĝema asocio. Ni ne plu estas izolitaj!!

Poste estis deciditaj kelkaj gravaj aferoj. Ekzemple pri partopreno de **Esperanto 80** (la asocia kotizo).

Por 2010–2011, ĉiu membro de **Esperanto 80** pagis 20 eŭrojn.

Por 2011–2012, ĉiu membro pagos... la samon.

Duonon de la kotizo (10 eŭrojn) ni redonos al la Federacio, kaj la ceteron ni konservos por niaj internaj bezonoj.

Fine de 2012, ni restudos la situacion. Se klare estis manko de vivrimedoj pro mankoj de mono en la kaso, kiuj malhelpis nin subteni niajn bezonojn, eble tiam ni petos iom pli altan mon-partoprenon de la membroj, sed ekde nun nenio pri kotizo ŝanĝiĝas.

Raportas **Cyrille DÉCOUTURE**

El Bulonjo Kunvenoj...

Ni kunvenas ĉiumerkrede en mia domo. Ni estas kvin personoj, kiuj kiel eble plej plibonigas nian scipovon de la lingvo, trinkante teon.

Raportis **Marie-Jeanne LINÉ**



Anonco pri E-kursoj en gimnazio

Ni komencas nun la trian jaron de la vivo de nia Esperanta klubo en la gimnazio "Jean-Marc Laurent" de Amieno (Francio).

La klubaj kunvenoj okazas ĉiujaŭde, de la 12-a kaj 45 ĝis la 13-a kaj 30. Tio estas dum la tagmeza intertempo. En Francio ja oni ne rajtas instrui Esperanton en la lernejoj dum la normalaj lernhoraroj. Do ĉiuj niaj klubanoj estas volontuloj.

La unuan jaron, ni ne volis por la lernantoj enmeti iun ĉiusemajnan kurson en la mallongan tempon tagmeze disponeblan. Ni decidis organizi perkorespondan kurson. Nij kursanoj sin esprimis franglingve en tekstoj poste de ni tradukitaj. Tiel ni donis al la kursanoj dukolumnajn tekstojn: unu kolumno kun la franca teksto de la kursano sendita; la alia kolumno kun la Esperanta teksto de la kursanoj ricevita.

La duan jaron, ni decidis alterni unuan semajnon de korespondado –

kiel ĉi-supre – kaj duan semajnon por parole prirespondi la prilingvajn demandojn de la kursanoj.

Bedaŭrinde tiu sistemo misfunkciis pro diversaj kialoj: ferioj, strikoj, vojaĝoj... Kaj tial ni perdis kelkajn kursanojn, nek de la skriba korespondado nek de la parola kursado kontentigitajn.

Sekve, ĉi-jare ni denove funkciigas nur la korespondan sistemon. Nij antaŭaj kursanoj ne plu povas ĉeesti la kunvenojn; ĉar la lernantoj de la 4-a kaj 3-a gradoj havas kursojn ekde la 13-a h.00. Bonŝance Trevor STEELE venis prelegi pri la aborigenoj en du klasoj de la 6-a kaj 5-a gradoj, kio entuziasmigis la lernantojn. Do ni rekomencis la kurson de la 17-a ekde Novembro.

Vi bonvolu trovi ĉi-sube almetitan ilian anoncon.

Esperante, ke kunlaboro estos ebla...

Raportas Daniel DEVIS

ANONCO SENDITA LA JAŬDON 16-AN DE NOVEMBRO 2011

Ni decidis sendi anoncon pere de "Edukado.net", por trovi korespondantojn:

"Ni estas kvin fraŭlinoj de la Esperanto-klubo de la gimnazio 'Jean-Marc LAURENT' en Amieno (130 kilometrojn norde de Parizo, en Francio).

Ni estas inter 11- kaj 13-jaraj. Ni deziras trovi korespondantojn en Japanio, en Sud-Afriko, en Alĝerio, en Tajlando kaj en Novjorko.

Kompreneble, se alilandaj personoj dezirus korespondi kun ni, ni volonte respondus al ili... Atendante legi reagojn, ni elkore salutas vin."

Lora DEBRAY, Camille MARTIN, Amandine LAMORY, Morgane CARRETTE, kaj Lia BENS.

El Dunkirko

Saluton el Libera Duno

Oni konas tiun rusan ŝercon:

"Mia avo multe vojaĝis. Li naskiĝis en Sankt-Peterburgo. Li travivis sian infanaĝon en Petrogrado. Li longtempe laboris en Leningrado. Finfine, li mortis en sia naskiĝurbo, Sankt-Peterburgo."

Ne nur la sovetoj ŝanĝis la nomojn de la urboj. Ŝanĝo de politika reĝimo, sendependiĝo, malkoloniiĝo, aneksado... estas okazoj por ŝanĝi la nomojn de urboj.

Sajgono iĝis **Ho-Ĉi-Min-Urbo**.

Leopoldville iĝis **Kinŝaso**.

Breslau iĝis **Wrocław**.

Christiania iĝis **Oslo**...

Sed mia Plena Ilustrita Vortaro, el-

dono de 1977, havas artikolon pri *Dancigo* sed ne pri **Gdańsk!**

Ankaŭ la francoj faris tiel.

Dum la franca Revolucio, al multaj urboj oni donis novan nomon, ĉar la antaŭaj nomoj aludis la nobelaron aŭ la religion. Tiel *Dunkerque* (flandre: la preĝejo de la duno) iĝis **Dune Libre** (Libera Duno), sed nur dum kelkaj monatoj en 1793-1794.

Nun, oni ŝanĝas la nomojn por aliaj kialoj.

Châlons-sur-Marne denove iĝis **Châlons-en-Champagne** en 1995, ĉar la regiono *Champagne* estas pli konata eksterlande ol la rivero *Marne*. Eĉ literaturo estas kialo por ŝanĝi

urbonomon: *Illiers*, urbeto de la departemento Eure-et-Loir, priskribita en la verko de Marcel **PROUST** sub la nomo *Combray*, iĝis oficiale *Illiers-Combray* en 1971.

Kelkaj aliaj komunumoj de nia regiono havis novan nomon dum la Revolucio:

Auxi-le-Château: **AUXI-LA-RÉUNION**
Condé-sur-Escaut: **Nord Libre**
Marquise: **Beaupré**
Montreuil-sur-Mer: **Montagne-sur-Mer**.

Daniel DAVID,
 Novembro 2011

El Dunkirko

Agad-raporto el Dunkirko

La 21-an de Septembro 2011, re-komenciĝis la kunvenoj kaj la kursoj.

La 22-an de Oktobro 2011, **Xavier VILAIN** partoprenis en la kunveno de la Federacia Komitato (Espéranto-Nord), en la "Office Culturel" en Arras.

La 12-an kaj 13-an de Novembro 2011, tri klubanoj partoprenis la 23-an Nordfrancan Eŭropan Esperanto-Renduon, en *Stella-Plage*.

La 16-an de Decembro 2011, okazis

la tradicia Zamenhof-festo en restoracio, en *Dunkerque*.

La 14-an de Januaro 2012, kelkaj klubanoj partoprenis renkontiĝon de la Esperanto-klubo de Bruĝo (Belgio). Okazos gvidata promeno tra la urbo matene, manĝo tagmeze, kaj **Mikaelo BRONSTEIN** venis kanti post-tagmeze.

La 24-an de Marto 2012, la klubo starigos budon en la 8-a "Salono pri Lingvoj en la interurba komunumdomo de Dunkirko", proponita de la

"Association pour le développement des langues sur le littoral dunkerquois" (ADLLD).

La 15-an de Aprilo 2012, klubanoj partoprenis en la kongreso de la Federacio *Esperanto-Nord* en *Wavrans-sur-Ternoise* (62).

La 27-an de Junio 2012, okazos la 20-a ĝenerala membrokunveno de *Dunkerque-Esperanto*.

Raportas **Xavier VILAIN**

El Lille-Villeneuve-Esperanto > METROPOLO

Metropolo-novaĵoj

La Esperanto-kursoj de LVE rekomenciĝis

En la "Kvartaldomo de Lille-Centre", *Rue des Fossés* en Lille.

Gvidate de **Katja BOEN** (03 20 92 31 36); ĉiumarde de la 18-a kaj 15 ĝis la 20-a.

Kunvenas 3 gekursanoj; por la elementa kurso.

En la **universitato Lille III**, en *Villeneuve-d'Ascq*.

Gvidate de **Michel DECHY** (06 16 98 41 02); ĉiumarde de la 18-a kaj 15 ĝis la 20-a.

Kunvenas 5 gelernantoj; por la elementa kurso.

En la **universitato Lille III**, en *Villeneuve-d'Ascq*.

Michel DECHY gvidas konversaciajn rondojn, kaj preparas al la trianivela ekzameno por kapableco, je datoj antaŭe interkonsentitaj kun la gekursanoj.

Por 5 progresantoj jam posedantaj la unuajn nivelojn kaj la duajn nivelojn diplomojn.

Rilatante kun **Michel** (06 16 98 41 02),

bone praktikantaj samideanoj povas partopreni kaj tiel kune animi tiujn konversaciajn rondojn.

En la mediateko de *Bersée*, *Place du Maréchal Alexander* en *Bersée*.

Gvidate de **Claude LONGUE-EPÉE** (03 20 59 28 80); ĉiulunde de la 18-a kaj 15 ĝis la 19-a kaj 45.

Kunvenas 8 gekursanoj; por la elementa kurso.

Paralele kreiĝis en Bersée "Ronda Tablo de Pikard-parolantoj"

Laŭ iniciato de **Claude Longue-Epée**, ĉiun trian vendredon de la monato, en kafejo, kunsidas grupo de "relative" maljunaj nostalguloj de la pikarda dialekto.

Kunvenas tiel inter kvar (plej ofte!) kaj dek kvin (plej malofte) *Bersée*-anoj, kiuj diskutas nur en la pikarda, antaŭ glaso da biero... aŭ de pli alkoholforta trinkaĵo.

La celo estas sin montri kaj sin aŭskulti por allogi kaj venigi vizitantojn de la kafejo.

La partoprenantoj diskutas laŭ neekzistanta tagordo pri ĉio ajn. Kaj ili ĉefe interŝanĝas memorarojn pri la "bona pasinta tempo".

Estas raporto pri tiu pikarda ronda tablo en nia rubriko pri Esperantolernado, ĉar la iniciatinta samideano **Claude** memoras, ke – freŝbakita esperantisto – tiam studento en Parizo li havis ofte okazajn diskutojn kun alilandanoj, japanoj, finnoj, slovenoj, ktp., kiuj parolis pri siaj respektivaj lingvoj, vivmodoj kaj kulturoj.

Tial li memoris, ke ankaŭ li havas specifan kulturon... kaj dialekton. Kaj sekve li energie enmergiĝis (ĝenerale diskutante kun si mem) en la prakticado de la pikarda de si iom forgesita. De tiam li same energie scias kaj proklamas, ke Esperanto – kiel efika interkomunikilo – ankaŭ estas plej efika protektilo kaj vigligilo de la kultura diverseco...

Raportas **Claude LONGUE-EPÉE**

La vizito kaj prelego de Trevor Steele en Lille

La fama aŭstralia verkisto **Trevor STEELE** estis gastigata en Lambersart de nia amikino **Katja BOEN** inter la 12-a kaj la 13-a de Oktobro 2011.

Dum lia restado estis organizitaj du posttagmezaj vizitoj kaj du vesperaj prelegoj; en *Lille* la 13-an de Oktobro kaj en Araso la 14-an de Oktobro (vidu ankaŭ la Arasan rubrikon de tiu nia gazeto).

Nia preleganto vojaĝis poste al *Amiens* kaj daŭrigis sian prelegvojaĝon tra Francio.

Ĵaŭdon posttagmeze, vizito de tipaj kvartaloj de Lille

Ekde la 14-a horo ĝis la 17-a horo, deko da gesamideanoj kun **Trevor STEELE** promenis sur kelkaj stratoj de la urbo, gvidate de **Claude LONGUE-EPÉE**.

Tiel promenante ĉiuj unue eksciis, ke la stacidomo de *Lille-Flandre* estas fakte la antaŭa stacidomo de *Paris-Nord*, malmuntita pro troampleksiĝo de la tiea fervojtrafiko je la fino de la 19-a jarcento, kaj rekonstruita en *Lille*. Ni ĉiuj admiris ĝian feran nitumitan ĉarponenton, kiu pensigas pri la Eiffel-turo.

Ni admiris ankaŭ la majestajn domojn de la *“Rue Faidherbe”*, prikonstruita samepoke kiel la stacidomo, por bone elmontri al la rigardoj tiun simbolon de la progreso kaj de la prospero de la ekonomia kaj komerca vivo. Ĝiaj domoj estas konstruitaj laŭ la *“Haussman”*-a stilo, el blankaj ŝtonoj, kun longaj horizontalaj balkonoj.

Ni, ĉe la ekstremo de tiu fama strato, alvenis tri jarcentojn antaŭe ĉe la *“Place du Théâtre”*. Tie ni admiris ties domojn konstruitajn tute malsimile de la Haussman-stilo, laŭ la *“Flandra Renesanca stilo”*, kun vertikalaj linioj el ruĝaj brikoj kaj blankaj ŝtonoj por la fenestraj framoj, kaj kun multaj skulptaĵoj ĉe la linteoj de la last-etaĝaj fenestroj.

Ĉi-relate estas dirinde:

Unue, ke tiu *“Flandra Renesanca stilo”* neniel kaj nenie troviĝas en Flandrujo, sed estas ja tipe *“Lille-a Renesanca stilo”*.

Due, ke *Lille* ja nomiĝas *“Ĉefurbo de Flandrujo”*. Sed ke fakte tie neniam estis parolata la flandra lingvo, sed nur la pikarda dialekto. Ĉi-tiu pikarda dialekto estas la *“langue d’oil”* plej parolata post la franca; fakte, de sudo ĝis nordo, inter *Beauvais* kaj *Tournai*; kaj, de okcidento ĝis oriento, inter la maro kaj Mons. Preter Mons estas ja parolata la valona, fakte tre simila kun la pikarda... kiu estas la naskolingvo de Tinĉjo...

Poste ni vagadis, laŭ la stratoj kaj placoj, senorde tra la jarcentoj.

Estis la mezepokaj jarcentoj, kun la domoj kaj aliaj konstruaĵoj de la *“Malnova Urbo”*: muroj el brikoj, blankŝtonaj volbaj linteoj de la fenestroj kun lignaj trabaroj de la vitraĵoj... tial plurfoje de brulegoj detruitaj kaj rekonstruitaj. Estis tiuepoka *“Hospice Comtesse”*, unue konstruigita de la grafino *Jeanne de Flandre* por ŝirmi malsanulojn, orfojn, pilgrimantojn al Sankta Johano de Kompostelo, plurfoje fajre detruita kaj rekonstruita.

Estis la 15-a jarcento de la diversstila palaco, kiu estis konstruigita de la Burgundia duko *Philippe*, kaj kie situas nun la turisma oficejo.

Estis la 16-a jarcento de la *“Flandraj”* renesancaj konstruaĵoj, kun la *“Malnova Borso”* konstruigita de alia *Philippe* – ĉi-tiu, reĝo de Hispanio, kaj do grandsinjoro de *Lille* –, por ŝirmi kontraŭ la pluvo kaj la vento la kunvenojn de la tiamaj *Lille*-aj komercistoj kaj oficialuloj.

Estis la 17-a jarcento de la aneksado de Ludoviko la XIV-a kaj kun la apero sur la konstruaĵoj de la franca klasika stilo. De tiu epoko ni vidis la nunan teatreton de la Granda Placo, kovritan de oraj lilifloroj kaj radiantaj sunoj – ambaŭ simboloj de la franca

reĝeco kaj de la franca reĝo Ludoviko. Fakte tiu konstruaĵo estis starigita por la reĝaj gvardiistoj, tiam taskitaj kontroli la *Lille*-anojn plimalpli ribelemajn kontraŭ la francoj kaj promenantajn en la malantaŭaj tiamaj buĉejoj!

Estis la 19-a kaj 20-a jarcentoj de la katedralo *“Notre Dame de La Treille”* anakronisme konstruita el betono laŭ gotika stilo kaj finita antaŭ nur kelkaj jaroj per tre moderna enirportalo el maldikegaj travideblaj paneloj el marmoro!...

Estis ankaŭ la 20-a jarcento: unue de la *“Nova Borso”* (Ĉambro de Komercio kaj Industrio), konstruita el brikoj post la unua mondmilito, sed laŭ la malnova flandrenesanca stilo kaj kun alta belfrido; due de la apuda *“Granda Teatro”* konstruita samtempe, sed el blankaj ŝtonoj laŭ la klasika stilo. Ambaŭ konstruaĵoj – tiel malsimilaj – estas de la sama arkitekto *Cordonnier*!...

Antaŭ la palaco de duko *Philippe* la gvidanto montris en la muro el brikoj larĝan fendon – antaŭnelonge ŝtopitan.

Li tiel klarigis la relativan malstabilon de la fundamentoj de la urbo. Fakte *Lille* konstruiĝis sur marĉoj inter multaj riveretoj. *Lille*-on trairis riverboatoj inter Dijono kaj Antverpeno.

Tio ĝustigas la malnovan nomon de la urbo: *“L’Isle”* (La Insulo).

Apud tiu palaco (nun turisma oficejo), la gvidanto montris la monumenton honore al la mortintoj de la unua mondmilito.

Li montris la skulptaĵojn, kiuj ne klarigas – kiel ofte – pri ĝojaj soldatoj kurantaj al la venko, sed kiuj montras malgajajn eluzatajn homojn de la *“deĵorŝanĝo”* aŭ de la *“militkaptiteco”*. Li montris kiel la surskribaĵo, antaŭa *“... Mortintaj por la paTRUJO”*, fariĝis *“... Mortintaj por la paCO **”* laŭ la volo de la urbestro *Salengro*, aktiva pacisto.

La vizitantoj amuziĝis diveni la karakterizojn de la internaj vandoj de la flandrenesancaj domoj.

Ĉi-tiuj vandoj estas maldikaj kaj de sama apartamento, kiam la ekstera skulptaĵo de la fasado montras du anĝelojn reciproke sin ĉirkaŭbrak-antajn.

Ili estas dikaj apartigantaj du mal-samajn apartamentojn, kiam la surmure skulptitaj anĝeloj turnas siajn dorsojn unu al la alia.

La vizitantoj, antaŭ la flandrenesanca *“Alignement de Beauregard”*, fronte al la Nova Borso, konkursis por eltrovi la plej grandan nombron da nigraj kuglegoj elbombitaj de la aŭstraj kanonoj dum la sieĝo de Lille en 1792 kaj kiuj restis enfiŝitaj en la fasadoj. Estas notinde, ke ne validas en la nombrado, sur la fasado de vendejo de virinaj subvestaĵoj, freŝdata roz-kolora kuglego kun bela bruna mamsuĉilo!!...

La vizitantoj ankaŭ devis vortludi en la franca lingvo (kaj doni necesajn klarigojn al Trevor) antaŭ la ŝuvend-ejo *“La BOTTE Chantilly”* de la strato *“Grande Chaussée”*. Ja tie loĝis **D'ARTAGNAN**, kiu estis la unua guberniestro de Lille, nomumite de Ludoviko la XIV-a, kaj kiu estis ankaŭ la kvara muskedisto (fakte reale ekzistanta, male de la tri aliaj) de **Alexandre DUMAS**.

Fakte la franclingva vortludo ne tradukeblas en esperanto: ja la *“boto”* (botte) de la vendejo neniel rilatas kun la *“pikfrapo”* (botte) de la spado de **d'Artagnan**.

La vizitantoj same devis vortludi, en mikso de franca kaj pikarda lingvoj, sur la strato de la *“Chats Bossus”*, antaŭ ŝildo de nigra kato ĝibumanta sian dorson. Mezepoke sur tiu strato vivis kaj prosperis tanistoj. Ili kutimis fiksi sur siajn pordojn la kapojn (do en la pikarda dialekto la *“Caboches”*) de la bestetoj, kies felojn ili estis tanintaj. Tial tiu strato fariĝis *“l' rue des Cabochus”*.

Multe pli poste iu urbestro decidis, ke: ni parolu franclingve, ne plu pikarddialekte; ne estas tie la strato

“des Cats Bochus”, sed la strato *“des Chats bossus”*!...

Lacigite de tiom da arkitekturaj kaj lingvaj ekscioj (kaj Trevor **STEELE** ankaŭ de la hordiferenco!), la promeni-intoj iris sidi en kafejo kaj regali sin per freŝaj trinkaĵoj apud la stacidomo.

Jaŭdon vespere, prelego de Trevor Steele

La vizitintoj de Lille retroviĝis, je la 18-a kaj 30, dum du horoj, en la teretaĝa granda salono de **MRES** (*Maison Régionale de l'Environnement et de la Solidarité*, de kiu LVE estas membro), kun aliaj gesamideanoj, kune konsistigante dudekon da aŭskultantoj.

Bedaŭrinde inter ili ne estis freŝ-diplomitoj (krom du) de la pasintaj lernoĵaroj, kiuj tamen estis sciigitaj pri la evento kaj invititaj partopreni ĝin.

Antaŭ la interveno de nia invitito, ni akceptis du junajn gestudentojn de la Alta Ĵurnalista Lernejo de Lille.

Ili intervjuis nian prezidanton *Michel*. Ĉi tiu, kun kelkaj aliaj amikoj, priantis la meritojn de Esperanto, ne sufiĉe emfazitajn, kompare kun iu ajn alia nacia lingvo. Pro ties lingvaj kvalitoj, pro ties facileco de lernado kaj de esprimado, pro ties precizeco kaj nuanceco, pro ties propedeŭtikeco ŝatiganta kaj faciliganta la studon de aliaj lingvoj. Kaj ankaŭ pro ties kvalitoj de neŭtraleco kaj de homaraneco.

Trevor **STEELE** poste tre kompetente parolis al ni pri sia lando. Kaj ĉefe pri ĝiaj praloĝantoj, la aborigenoj, el kiuj restas proksimume 2% el la Aŭstralia loĝantaro.

Trevor bone konas tiun medion de la aborigenoj, kiujn li instruas en norda provinco de Aŭstralio.

Ĉio kion li precizigis estis nova por ni – ĉiukaze por tiuj kiuj ne legis liajn librojn.

Fakte nur de la jaro 1967, kaj de tiamaj Aŭstraliaj leĝoj, la aborigenoj estas laŭleĝe normalaj Aŭstraliaj civitanoj kun la samaj rajtoj kiel la blankaj koloniintoj.

Ja, malgraŭ ke la aborigena civilizacio

estas pli malnova ol la egipta civilizacio en Egiptio, la aborigenoj estis dum jarcentoj enkarcerigitaj, turmentegataj, en-servutigitaj, deportitaj – ĉu surloke ĉu en Usono, de la bazaj koloniantoj.

Ankoraŭ nun, kaj malgraŭ siaj oficialaj civitanaj rajtoj – kaj siaj elmontritaj ecoj de artistoj, pentristoj ktp. – la aborigenoj havas, laŭ Trevor **STEELE**, plej ofte sufiĉe strangajn kondutojn. Ŝajnas ke nur tiuj, kiuj diverskiale estis “ŝtelitaj” kaj malproksimigitaj de siaj patrinoj, vivas poste normalan vivon kaj kapablas evolui same kiel la « blankuloj » en samaj profesioj kaj postenoj, kiel ĉi-ties.

Trevor emfazas de iuj “banalaj” aborigenoj la strangajn komplik-egajn lingvaĵojn kaj esprimojn, ilian strangan sintenon antaŭ la “fantomeco” de aliaj samgentanoj, kaj ilian ĝeneralan strangan malpuremon kaj malordemon!...

Tia tre atentokapta prelego naskis multajn interesajn demandojn de la aŭskultantaro kaj same interesajn klarigojn de la preleganto.

Poste ĉi-tiu prezentis kelkajn el siaj libroj kaj denove interŝanĝis pri ili interesajn ideojn kaj rimarkojn. Li vendis kelkajn librojn.

Post la prelego, vesper-manĝo kun Trevor STEELE

Oko da gesamideanoj, inkluzive de nia invitito, retroviĝis en Magreba restoracio por agrabla vespermanĝo el tradicia kuskuso aŭ aliaj Magrebaĵ pladoj el kokidajoj aŭ ŝafidaĵoj.

(Mi persone tre ŝatis tion kio estis en mia telero; sed bedaŭrinde mi ne povas paroli pri tio, ĉar mi ne kapblas traduki “Tajine”!)

Fakte la manĝo kaj la konversacio estis bongustaj.

Kaj ĉiuj foriris kontentaj pro tiu interesa posttagmezo.

Kelkuij el ni retroviĝis dum la morgaŭo, akceptite de la Arasanoj, kiuj nin regalas per tiel bonaj vizito, prelego, vespermanĝo kaj konversacio...

Claude **LONGUE-EPÉE**

Agad-raporto el LVE

Ĉiumonata membrokunveno

Okazas la trian jaŭdon de ĉiu monato. De la 18-a kaj 30. En "Fos-Tennis" en Villeneuve-d'Ascq.

Ĉiusemajnaj kursoj

En la **universitato Lille III**. Inter la 18-a kaj 15 kaj la 19-a kaj 45. Gvidataj de **Michel DECHY**.

– Por la **komencantoj** de la elementa nivelo: ĉiumarde.

– Por la **praktikantoj** de la praktika nivelo: du lundojn ĉiumonate.

En la "**Kvartaldomo de Lille-Centre**", Rue des Fossés.

Gvidataj de **Katja BOEN**.

– Por la **komencantoj**: ĉiumarde.

En la medioteko de **Bersée**. Inter la 18-a kaj 15 kaj la 19-a kaj 45.

Gvidataj de **Claude LONGUE-EPÉE**.

– Por **komencantoj** de la elementa nivelo: ĉiulunde.

Someraj Staĝoj

De la 4-a ĝis la 8-a de Julio: dum 1 horo kaj duono ĉiutage.

Kvin kursoj de lundo ĝis vendredo.

Aŭgusta sesio ne povis okazi. La ĉefa celo de tiu staĝo estas malkovrigi la riĉaĵojn de Esperanto kaj tiel ebligi

poste la partoprenon en la ĉiusemajnaj kursoj dum la jaro.

La "Universitato de la Libera Tempo"

Dek kursoj daŭrantaj de la 10-a ĝis la 12-a. Ĉiun vendredon matene. Gvidataj de **Michel DECHY**. Ĉi-jare, por komencantoj.

La TTT-ejo de la klubo: www.lve-esperanto.org

Ĝi estas la ĉefa fonto de klarigoj pri la aktivajoj de la asocio.

Ofte personoj (lernantoj aŭ ĵurnalistoj), konsultinte ĝin, kontaktas nin. Ĝi estas ankaŭ la memoro kaj la biblioteko de la klubo; kaj multaj ligiloj estas ofte utiligitaj.

Prelegoj kaj prezentado de la lingvo Esperanto

– Kadre de la kulturaj semajnoj: prezento de la lingvo en Kolegio *Molière* de Villeneuve-d'Ascq la 13-an, 14-an kaj 15-an de Aprilo, kaj en Kolegio "*Saint-Exupéry*" de Hellesmes la 6-an kaj 7-an de Aprilo.

– Ĉiujare la bazaj lernejoj "*Anatole France*" kaj "*Picasso*" invitas **Michel DECHY**, kiu proponas tri prelegojn

po unu horo kaj duono por ĉiu (prezentado, matematika kurso en Esperanto, sorobano en Esperanto).

Dejorado en diversaj budoj

– Festivalo de la lingvoj, en la Ĉambro de Komerco kaj Industrio de Lille: la 8-an kaj 9-an de Aprilo.

– Foiro de la Asocioj de Lille, en la "Stacidomo *Saint-Sauveur*": la 25-an kaj 26-an de Junio, kaj en "*Palladium*" de Villeneuve-d'Ascq: la 11-an de Septembro.

– Brokantado de Lille, unu budo en Bulvardo *Louis XIV*: la 3-an de Septembro, nuligita vespere je la 21-a horo kaj dimanĉe pro fulmotondro!

– Salono de la aŭtoroj kaj kolektantoj, en la salono "*Concorde*" de Villeneuve-d'Ascq: la 6-an de Novembro.

– Festivalo de la bildstrio, en *Lys-les-Lannoy*: la 12-an kaj 13-an de Novembro 2011.

Ekzamensesio en "MRES"

Okazis la dimanĉon 19-an de Junio en la salonoj de la "MRES" en Lille.

Raportis **Michel DECHY**

El Valenciennes

Agad-raporto el Valenciennes

La kursoj en la Domo de Asocioj de Valenciennes okazas:

– 1-a grado: ekde la 6-a de Oktobro, ĉiun jaŭdon je la 10-a ĝis la 12-a kun ses gelnantoj.

– 2-a grado: ekde la 8-a de Oktobro, ĉiun sabaton je la 10-a ĝis la 12-a ankaŭ kun ses gelnantoj.

Jean DIETRICH, ĉeestis, la 22-an de Oktobro 2011, en la kunveno de nia nordfederacia komitato en Araso.

Stella-Maris

La 12-an kaj 13-an de Novembro, ok Valencianoj partoprenis, kun granda kontentiĝo, en la **23-a Eŭropa Rendevuo** de "*Stella Maris*". Dum tiu aranĝo, **Jean DIETRICH** ricevis de la Norda Federacio, nome de Valenciennes-Espéranto, la diplomon de Stelsemantoj pro aktiva agado por la petskribo "*Espéranto au baccalauréat*".

Esperanta Kavaliro

La 8-an de Novembro, nia klubo kasisto **Guy Deladrière**, 83 jaraĝa, fariĝis kavaliro en la ordeno de la Agrokultura Merito. De longatempem, li estas loka korespondanto de la asocio "La ĝardenisto de Francio" kaj komitatano de la "Floritaj Domoj" en St-Saulve.



Raportis **Jean-Marc FRATARD**

Atesto el infaneco

1940: En la profundo de mia memoro

Mi revidas min kiel naŭjara knabon, senpatrinan.

Ekstere, ni aŭdis la falantaj bomboboj. La tutpotenca patro ordonis: "Ni fuĝu! Ni rapide fuĝu antaŭ la alveno de la germana armeo!".

Kaj li, senprokraste, preparis biciklon... Verŝajne retrovitane en subtegmenta ĉambro.

Biciklo tiam fabrikita tia: solida, peza, nerompebla, kun dikaj pneŭmatikoj, kun malantaŭa pakajportilo.

Kaj oni fiksis sur tiu portilo malgrandan selon por mi... Lasantan miajn kruojn sen piedingoj en vakuo!... Do, rapide ni fuĝis, ĉar jam aŭdeblis la germanaj ĉasaviadiloj "Stuka" kaj la terura bruo de falantaj bomboboj.

Kaj ni fuĝis...

Patro pedalis inter la jam svarmantaj fuĝantoj.

Ni tiel atingis Valenciennes...

Jam aŭdeblis la kanonoj...

La batalo alproksimiĝis...

Rapide ni devis plu forfuĝi malproksimen...

Sed estis malfacile inter la homoj, civiloj aŭ soldatoj, ĉaretoj, aŭtoj, bicikloj...

La vojo estis plenplena de homoj, de kadavroj de bestoj...

Ĉe la horizonto, kiel ruĝan subiron oni povis vidi kaj imagi la kruelecon de la batalo...

De tempo al tempo, ni devis transalti vojfosojn, ŝirme de tiuj sataneaj bomboboj!...

En iu domo – verŝajne antaŭa kafejo – boteloj estis duon-frakasitaj, verŝajne pripaftaj kiel celoj por amuzo...

Ĉar miaj kruoj pendis en la vakuo, mi ege suferis.

Sed feliĉe mia patro trovis kompateman forĝiston, kiu lutis du piedapogilojn sur la bicikla kadro.

Mi estis pli feliĉa poste...

Ankaŭ gravuritas en mia memoro terura bruo de sufiĉe proksime falanta bombo.

Mi estis tiel impresita, ke mi restis ne manĝanta dum la tuta tago!

Kelkfoje survoje ni renkontis strangajn ulojn, kiuj parolis duongermane, duonfrance; kaj ni tuj imagis ilin membroj de la "kvina kolono" (spiono!).

Ni direktiĝis al *Saint-Quentin*.

Intertempe, mi trovis infanbiciklon... Biciklo tute taŭga por mi...

Kia feliĉo!...

La patro volis engaĝiĝi por batali en la brita armeo; kaj pro tio li direktiĝis al *Cherbourg*.

Survoje malgrandoj da britaj tankoj rapide kaj danĝere fuĝis, por rapide enŝipiĝi.

(Mi tute ne havis ideon pri la milito, pri strategiaj eventoj okazantaj en Dunkirko).

Kiam ni atingis *Cherbourg*-havenon, estis giganta ŝipo, plena de soldatoj pretaj fuĝi al Britio.

Mia patro alvokis la responsulon por enŝipiĝi.

Sed li ricevis nean respondon:

"Por militumi, ni bezonas plenkreskulon, ne infanon!... Infano ne militas!..."

Tial patro ŝanĝis sian planon kaj bicikle direktiĝis al *Poitiers*...

La regiono estis pli paca kaj ni ĉiam trovis afablajn kaj gastemajn homojn. Ni dormis kelkfoje en garbejo. Kaj mi ankoraŭ nun memoras pri musoj sur mia korpo kaj pri pikanta pajlo!...

En *Poitiers* mi ĉeestis en la elementa lernejo dum tri monatoj.

Mia patro instruis matematikon.

Mi havis klaskamaradojn kaj ni ludis per glibetoj sur iu placo de *Poitiers* antaŭ iu preĝejo.

El tiu epoko mi memoras ankaŭ la vorton "*promontoire*" (promontoro), kiun klarigis nia instruistino...

Post tri monatoj, la patro decidis reiri al Belgio.

La etoso tie fariĝis malbona; la reĝo kapitulaciis.

Survoje al Parizo oni malliberigis mian patron.

Kaj mi, tutsola naŭ-jara knabo, devis reiri hejmen! Kiel elturniĝi?!...

ENHAVO

NIAJ MEMBROJ VERKANTAS

★ 1940: En la profundo de mia memoro	p11
★ Ne plu bezonata ĉapo	p12
★ Abosphere kaj Schiaffino (2)	p14
★ Pri Boris Vian	p15
★ Eŭropa armita forto. Uzado de la angla lingvo?	p16
★ La kanto de la maizo	p17
★ Mallongaĵoj	p19
★ Atentigo de la redaktoro	p20
★ Asociaj kaj redakciaj informoj	p20

Tute hazarde, apud Parizo mi vidis kamionon kun belga ŝildo plenplena de homoj.

Ne plu estis loko, sed mi estis tiel kompatinda, ke finfine mi estis akceptita, kun mia biciklo.

Tamen, la kamiono iris nur al *Tournai*, 100 kilometrojn for de mia domo...

Kaj vesperiĝis kiam ni alvenis en *Tournai*.

Mi tute hazarde frapis iun pordon, kaj iu virino alvenis.

Ŝi tuj kompatis al mi; ŝi nutris kaj gastigis min!...

Mi estis ege feliĉa: verŝajne – laŭ mia nuna supozo – ŝi volis min adopti!...

Dum la tago, per mia biciklo, mi helpis francajn soldatojn en la stacidomo de *Tournai*.

Mi aĉetis tabakon en apudaj vendejoj; ĉar ili ne rajtis delasi la vagonojn plenplajn.

Post kelkaj semajnoj, oni anoncis per radio-elsendo, ke patro mia serĉas 9-jaran perditan knabon!...

Estis la fino de mia aventuro dum la komenciĝo de la milito.

Raportis Marcel **DELFORGE**

Iom plu pri Stella Ne plu bezonata ĉapo

Jam estas kvarono post noktomezo, dimanĉon la 13-an de Novembro 2011. Mi rehejmenigiĝis antaŭ duon-horo, kaj nun sidas antaŭ mia klavaro. Mi repensas pri la antaŭa posttagmezo, kiu disvolviĝas kvazaŭ filmo en mia menso.

Komence de la filmo estas do la 12-a de Novembro, tuj post la tagmanĝo. Jam pasis unu jaro, kaj denove estas tempo startigi la motoron por veturi al *Stella-Maris*. Sed miaj hodiaŭaj kunvojaĝantoj Siĉjo kaj Teĉjo videble aŭdis pri mia pasintjara vojerareto, kaj tre atente kontrolas mian stiradon. Post apenaŭ tridek sekundoj mi aŭdas: "Ne forgesu, ke la Eŭropa Rendezuo ne plu okazas en *Morbecque!*". Mi decidis ne respondi, kaj ŝajnigas, ke la stirado postulas mian plenan atenton.

Tamen la enaŭta etoso baldaŭ fariĝas iom peza. Do, ĉar mallerta abelo ĵus decidis traflugi la aŭtovojon kaj subite frakasigas kontraŭ la ventŝirmilo, mi starigas demandon: "Ĉar vi ne plu estas komencantoj, vi tutcerte konas Zamenhofan proverbon pri abeloj, ĉu ne?".

– Jes! tuj respondas Siĉjo, mi konas unu... atendu... Ha! Jen: "**Abelon ne incitu, anason ne tiklu**". Kvankam la citaĵo ŝajnas al mi iom malpreciza, mi eĉ ne provas korekti ĝin, pro zigzaganta brita aŭtomobilo, kiun mi sensukcese provas preterpasi.

Post du kilometroj, la ĝusta proverbo preskaŭ trairis la barilon inter mia memoro kaj mia lango, sed Teĉjo subite anoncas:

– Ankaŭ mi konas Zamenhofajn proverbojn pri insektoj. Jen: "**Al formiko nova ne fidu cikado**".

– Ŝajnas al mi, ke vi iomete konfuzas Zamenhof kaj *La Fontaine*, komentas Siĉjo.

– Jes ja! aldonas mi, la ĝusta proverbo komenciĝas per "**Al amiko nova...**", ĉu ne? kaj mi preskaŭ certas, ke ĝi ne finiĝas per "cikado"...

– Nia kara instruanto tutcerte konas multajn aliajn proverbojn pri bestetoj... tiam perfile sugestas Teĉjo.

– Jen pli bona ideo, respondas mi. Estus interesa ekzerco, ke vi lernantoj provu trovi la ĝustan finan parton de kelkaj maksimumoj. Ekzemple, se mi diras al vi: "**Al grandaj sinjoroj grandaj...**", kion vi respondas?

– **Kruroj!** samtempe ekkrias ili ambaŭ, kaj ekridegas.

– Ne estu stultaj, mi petas. Fakte mi ne plu certas pri la ĝusta fino, sed en *Stella-Maris* multaj samideanoj tutcerte kapablos diri ĝin...

– Proponu alian proverbon, kaj ni respondos plej serioze, promesas Siĉjo.

Verŝajne ĉar ni sekvas ruĝan buson, kiu jam de tri minutoj provas preterveturi longan kamionon kun longa remorko, mia lango iom stumblas: "**Eĉ malgranda buso ne estas sen...**".

Sekvas longa silento. Mi ironie ekrigardas al mia najbaro, kaj rimarkas... ironian rideton ĉe lia vizaĝo.

– Ĉu vi ankoraŭ ne trovis? demandas mi.

– Ĉu vi certas, ke Zamenhof imagis proverbojn pri busoj? rebatas Teĉjo. Se tiel estas, aldonas li, mi proponas la jenan respondon: "**Eĉ malgranda buso ne estas sen muŝo**".

– Traf! ekridas Siĉjo, kaj nur tiam mi memoras, ke la proverbo fakte komenciĝas per: "**Eĉ malgranda muŝo ne estas sen...**". Bedaŭrinde la lasta vorto pigradas funde de mia memoro.

Teĉjo tiras broŝuron el sia sako, iomete foliumas ĝin, kaj fiere anoncas: "Bonŝance, multaj Z-proverboj estas listigitaj en tiu ĉi broŝuro. Ni tuj ekscios, ĉu nia instruanto bone konas ilin... Mi legos por vi kelkajn proverbojn, en kiuj mi intence enŝovos erarajn, kaj vi provu reĝustigi ilin. Ĉu bone?"

Mi esperas, ke mia vizaĝo ne tro paliĝis, kaj respondas plej trankvile:

– Kvankam la stirado postulas mian plenan atenton, mi ja provos, sed kompreneble Siĉjo rajtas helpi min!

– Konsentite! diras Teĉjo. Jen la unua: "**Atendis, meditis, ĝis bombonon englutis**".

– Ĉu "**karamelon**" anstataŭ "bombonon"? provas mi...

– Ne! Jen dua proverbo: "**Ankaŭ al nia nesto venos iam kukolo**".

– Nu, tio ŝajnas al mi tute logika. Verŝajne vi forgesis enŝovi eraron...

– Tute ne! Jen via tria kaj lasta okazo gajni unu poenton: "**Al la malamik' en kuro faru ponton sen planko**".

– Mi ja konas tiun proverbon, sed pro la stirado, kiu..."

– Ho jes! ...kiu postulegas vian tutegan atentegon. Ne gravas! Ni plu ludos poste, en Stella...

Kiam restas apenaŭ dudek minutoj da veturado, la nebuleto kiu akompanas nin jam de preskaŭ unu horo subite fariĝas iom densa nebulo, la suno tute malaperas, kaj ni eksentas ioman malvarmon.

– "**Afable varmo pli atingas ol frosto**" solene anoncas Teĉjo.

– Kial vi diras tion? demandas Siĉjo, dum mi provas ekvidi tra la nebulo nevideblajn veturilojn.

– Temas pri plia erara proverbo.

– Silentu, mi petas, aŭ okazos akcidento! iom tro seke rebatas mi, antaŭ ol lastsekunde eviti malrapidegan aŭtomobilon, sur kies malantaŭa vitro videblas verda steleto...

– Ju pli mi observas vin, des pli mi opinias, ke por sekura stirado "**aĝo maljuna ne estas infana**" aldonas li tamen.

– Ne estu malĝentila! protestas mi.

– Malĝentila mi ne estas! Se tia mi estus, mi dirus al vi la ĝustan kaj tute pravan proverbon. Ĉu vi deziras aŭdi ĝin?

– Ne nun! Dankon! Vi eble scias, ke hodiaŭ okazas en la urbo Etaples grandega haringo-festo, kaj longa vico da senmovaj aŭtomobiloj probable atendas nin ĉe la aŭtovoja elirejo. Kaj tio kaj la veteraj kondiĉoj vere

postul...

Mi ŝajngiu, ke mi ne aŭdis ilian apenaŭ subpremitan ekridon. Konsolas min la penso, ke Zamenhof espereble forgesis proverbumi pri haringoj.

Ha! Finfine revenas iom da sunlumo, kaj tri minutojn poste jen aperas la panelo "Stella-Maris", kaj ni elaŭtiĝas. Mi proponas, ke ni tuj aliru la akceptejan salomon. Teĉjo sprite respondas: "**Aliro kaj pordo rajdas duope**", sed feliĉe, ĉar mi nun ne plu stiras, mia memoro rapide retrovas la precizan proverbon. Tamen, mi deklaras serioze:

– Ni devas nun anonci nian alvenon. Ne plu estas tempo por ludi.

Ĉi-foje rebatas Siĉjo: "**Alia tempo, aliaj horoj**".

– Redonu al mi mian broŝuron! ekkrias Teĉjo, kiu dek sekundojn pli frue ol mi korektas la lastan vorton.

Pasis apenaŭ dek minutoj, kaj mi nun serĉadas inter la libroj de la libro-servo kaj ankaŭ sub la tabloj, ĉar mi jam perdis la ĵus ricevitan plastan identigan karteton, kiun mi promesis redoni al la organizantoj ĉe la fino de la rendevuo. Ba! se mi elŝteliĝos ĉi-vespere antaŭ la fino de la spektaklo, ili ne havos okazon riproĉi min...

Nun estas la 15-a, kaj fronte al la mikrofono jam ariĝis ĉiuj partoprenantoj. Nu... preskaŭ ĉiuj, ĉar hodiaŭ, unuafoje ekde mia esperantistiĝo, mi sukcesas foti sen iu ajn alia ĉeestanto la tutan libron alportitan de la Genta libro-servo. Subite venas al mi la ideo, ke se iu fiulo jam antaŭe forprenis senpage iun libron, kaj se nun alvenus responsulo kaj konstatus, ke mankas ekzemple iu PAG-o, li povus akuzi min pri ŝtelo de tiu nepagita PAG-o! Kiel mi povus pruvi mian senkulpecon?

Nu, estus facile argumenti: ŝajnas al mi, ke Zamenhof mem asertis: "**Infano ŝtelas libron, grandaĝulo ŝtelas bonon**", dum mi, jam 67-jarulo, ne preskaŭ plu estas infano. Be... Ĉar Teĉjo rifuzis prunti al mi sian broŝuron, mi ne povas tuj kontroli la ĝustecon de la proverbo, do mi

prefere iru nun aŭskulti la finon de la bonveniga parolado de *Arlette* kaj *Edmond PLUTNIAK*. Sed fakte staras jam ĉe la mikrofono *Katalin KOVÁTS*, kiu disdonas diplomojn por rekompeni tri sukcesplenajn feriadojn en la universitata urbo Poznań. Kaj tuj post la disdonado komenciĝas la laboro en la diversaj grupoj.

Eble pro la Zamenhofa aserto, ke (laŭ mia necerta memoro) "**Kiu kuraĝe aliras, facile eliras**", nur tri kuraĝuloj laboras kun *Anne JAUSIONS* pri la franca triagrada ekzameno.

En alia salono, ok ne elirintaj kuraĝuloj silente trapasas apud *Kristin TYTGAT* provekzamenon laŭ la oficiala eŭropa referencokadro.

En tria ĉambro, *Renée TRIOLLE* babiladas pri **Unesko** kun dek unu personoj, inter kiuj mia lernanto Siĉjo, kiu bone aŭskultas sed nenion diras. Fotante kaj filmante, mi alproksimiĝas al li, kaj mallaŭte demandas, kial li ne parolas.

Silente li skribas sur paperfolioj: "**Ju pli oni babilas, des pli oni mal-silentas**", kaj mi tuj divenas, ke li ne redonis la broŝuron al Teĉjo. Ĉar mi videble ne komprenas, kion li celas, li flustras al mia orelo: "Se vi konus la ĝustan proverbon, vi tuj komprenus, kial mi ne parolas..."

Ridetante por ŝajnigi, ke mi ja komprenas lian humuraĵon, mi senprokraste decidas viziti alian grupon...

Mi nun eniras la salomon, kie *Katalin KOVÁTS* instruas esperantlingve al proksimume dek kvin komencantoj, dum dek tri instruantoj (kiujn ŝi nomas "spionoj") atente observas. Feliĉe, nek Teĉjo nek Siĉjo ĉeestas, do neniu fuŝa proverbo perturbas niajn orelojn.

Por klarigi la diferencon inter "kiu" kaj "kio", *Katalin* aperigas sur la ekranon foton de la nuna franca prezidento, kaj demandas al sia juna filo *Marteno*: "Kiu estas tiu viro?". Post kelksekunda hezito la knabo respondas: "Mister Bean". Sekvas laŭta ĝenerala ridado, kaj mi pensas: "**De majesta ĝis ridinda estas nur unu**

paŝo". Mirinde! Ja ŝajnas, ke mi sukcesis citi tiun ĉi proverbon senerare! Bedaŭrinde Siĉjo kaj Teĉjo ne ĉeestas por konstati mian grandfaron...

Poste, dum *Georgo HANDZLIK* ludas gitaron kaj kantigas la komencantojn, en apuda ĉambro *Katalin* klarigas al la "spionoj", kiamaniere ili povos mem post la paŭzo laborigi la komencantojn.

Nun estas la paŭzo, kaj ĉiuj partoprenantoj (inter kiuj Siĉjo kaj Teĉjo) vikle babiladas en la akcepteja salono. Tamen ne tre plaĉas al mi konstati, ke miaj du lernantoj iom ridaĉas, kiam ili rigardas al mi. Morgaŭ (aŭ eble ĉi-vespere) mi reparkerigos ĉiujn Z-proverbojn, kaj poste ambaŭ ŝercemuloj ekscios, ke "**plej bone ridas, kiu haste ridas**" (aŭ io simila...)!

En la grupo gvidata de *Sylvain LELARGE* regas movoplena etoso: iuj partoprenantoj provas sen korktirilo elverŝi vinon el ŝtopita botelo, dum aliaj iras de tablo al tablo provante diveni por kio utilas pluraj strangegaj iloj. Ĝuste kiam mi staras apud Teĉjo, la kursgvidanto klarigas, ke li provas kolekti pruvojn de la homa genio. Tiam murmuris Teĉjo:

– Sengenja talento apenaŭ valoras. Sentalenta genio valoras nenion.

– Ĉu temas denove pri falsita Zamenhofaĵo?

– Ne, mi simple provis esperantigi citaĵon de *Paul VALÉRY*...

– Pfff...

Post la laboro atendas nin kiel pasintjare (aŭ kiel ĉiusabate? aŭ eble kiel ĉiuvespere?) en la restoracio, fiŝsupo, fritoj kaj mituloj, fromaĝo kaj glaciaĵo. Ĉar Zamenhofaj proverboj kreskas nek sur mituloj nek sur krokodilado, Siĉjo kaj Teĉjo ne provas inciteti min, kaj la vespermanĝo disvolviĝas kontentige sed malrapide.

Kvankam la oficiala programo anoncas, ke la spektaklo de *Georgo HANDZLIK* komenciĝos je la 20-a kaj 30, kiam mi eniras (iom malfrue)

la spektaklejon, ĉeestas nur tri personoj, inter kiuj la aktoro kaj la prezidantino de la Norda Federacio. Evidente kulpas la mituloj, ĉar ĉiu el ili postulas la plenan atenton de sia manĝanto! Iom mirigas min, ke Zamenhof ne konsciis pri tio, kaj neniam skribis: **“Donu mitulon al avidulo, ĝi tutan atenton postulas”**.

Finfine alvenas amase (sed tre malfrue) la venkintoj de la mitula milito, kaj la salono pleniĝas. Jam estas la 21-a kaj 35, kiam *Arlette* (esperantlingve) kaj *Edmond* (franclingve) prezentas la temon de la teatraĵo, nome la lastan tagon de Zamenhof. Mi aŭdis, ke *Georgo HANDZLIK* kutimas partoprenigi la publikon, jen per demandoj, jen per trinkado de alkoholaĵoj, ktp. Des pli ke mi firme sidigis ilin apud mi ĉe la lasta vico, for de la okazantaĵoj, mi havas fortegan esperon, ke nek Siĉjo nek Teĉjo intencas partopreni pere de imagaj maksimumoj.

Jam de kvardek minutoj ĉiuj spektantoj spektas, multaj ridantoj ridas, kelkaj spertuloj sperte respondas demandojn de la aktoro, iuj d(t?)rink-

emuloj eĉ t(d?)rinketas el lia glaseto, sed mi nepre devas nun elŝteliĝi antaŭ la fino de la spektaklo, pro la perdita plasta karteto, kiun mi solene sed nesingarde promesis redoni al la organizantoj.

Mi do flustras al miaj du najbaroj, ke nun finiĝas por ni la teatraĵo, kaj ni silente ekstaras kaj paŝas al la elirejo. Pro la ekstera malvarmo, mi tuj surmetas mian bereton, kio instigas Teĉjon eldiri sian lastan ĉi-vesperan spritaĵon: **“Kiu perdis la karton, ne bezonas jam ĉapon”**.

La filmo finiĝas per monotona nokta reheimveturado, dum kiu okazas nek akcidento, nek paneo, nek falsado de proverboj. Resume: “fino bona, ktp.”.

Kaj nun, hejme, jam de unu horo mi tajpas sur mia klavaro. Mi retrovis la ĝustan version de ĉiuj proverboj, kiujn mi aŭdis, pensis, aŭ eldiris hodiaŭ... ne! hieraŭ. Kaj vendredon, kiam ili alvenos en la kursejon, mi devigos ambaŭ miajn proverbumulojn parkerigi ilin. Jen do por ili:

1/Abelujon ne incitu, amason ne spitu

- 2/ *Al amiko nova ne fidu sen provo*
- 3/ *Al grandaj sinjoroj grandaj honoroj*
- 4/ *Eĉ malgranda muŝo ne estas sen buŝo*
- 5/ *Atendis, meditis, ĝis en tombon englitis*
- 6/ *Ankaŭ al nia nesto venos iam la festo*
- 7/ *Al la malamik' en kuro faru ponton kun plezuro*
- 8/ *Afable vorto pli atingas ol forto*
- 9/ *Aĝo maljuna ne estas oportuna*
- 10/ *Akiro kaj perdo rajdas duope*
- 11/ *Alia tempo, aliaj moroj*
- 12/ *Infano ŝtelas ovon, grandaĝulo ŝtelas bovon*
- 13/ *Kiu kuraĝe aliras, facile akiras*
- 14/ *Ju pli oni babilas, des pli oni al si malutilas*
- 15/ *De majesta ĝis ridinda estas nur unu paŝo*
- 16/ *Plej bone ridas, kiu laste ridas*
- 17/ *Donu fingron al avidulo, li tutan manon postulas*
- 18/ *Kiu perdis la kapon, ne bezonas jam ĉapon.*

Verkis *Jean HENNEBERT*

Pri Dunkirko Abosphere kaj Schiaffino (2)



Libro “Memoraroj el la haveno”

Ĉe la havena ekspozicio, por figuri dokiston de la 1950-aj jaroj, oni povus preni manekanon, nek grandan, nek dika sed kun dikaj manoj kelkfoje spektindaj, iomete kurba-dorsan kaj kun kruroj arkaj pro portado, oni metus al li laborĉemizon kun kolumo, trikitan puloveron

vintre kiel somere, laborpantalonojn streĉitan per biciklaj pinĉiloj, bluan tolan jakon, kanadan peltjakon en ledo rapide eluzita, aŭ malnovan kurtigitan surtuton... Ĉe la piedoj, altajn aŭ malaltajn ŝuojn laŭ la laboro; ili ne havis sekurŝuojn. Sur la kapo, kaskedon aŭ senkoloran bereton.

Se estus vintra dokisto, oni intermetus, inter la bluan jakon kaj la kanadan peltjakon, maljunan jakon el kompleto. Oni donus al li biciklon ĉe lia mano, nepre ne virinan biciklon, estis malhonoro alveni al haveno per virina biciklo, biciklon kun dika lumo, dikaj kotŝirmiloj, kaj sen rapidumo.

Oni surdorsigus al li dokistan sakon. Speco de marista sako el dika baŝo,

streĉita per ŝnuro kiu oblikve surus lian bruston. En la sakon, oni ne forgesus loki hokon kaj “kapt’che”n, sed oni povus forgesi sekurgantojn, plejofte li ja laboris nudmane.

Sur lia dorso, oni ankaŭ aldonus faskon da ligno, nome faskon da tabuloj por ekbruligi fajron.

Tiumomente, oni suprenirus sur seĝon kaj oni ŝutus sur la kapon de la ulo, sakon de kvindek kilogramoj da cemento aŭ da karbopolvo. Tiam, ĉiuj ĝuste imagus kiel aspektis niaj patroj kiam ili revenis hejmen. La bagnuloj el *Cayenne* estis pli puraj ol ili kiam ili revenis al bagno vespere.

Verkis *Irène BUNJET*

Traduko

Pri Boris Vian – Difinita de Raymond QUENEAU

Kun antaŭtraduka enkonduko de Claude LONGUE-ÉPÉE

Jam de longtempe mi admiras *Boris VIAN*. Mi admiras lin, ne nur pro tio, ke li inĝenierigis kiel mi en la sama “Centra Lernejo de Parizo” (kvankam 10 jarojn antaŭ mi!). Mi admiras lin ne nur pro tio, ke li kapablis samtempe taŭge ĉiutage plenumi siajn taskojn de inĝeniero de **AFNOR**, ke li kapablis preskaŭ ĉiunokte muzikludi en “kelaj” kabaretoj, kaj ke li kapablis intertempe verki interesajn romanojn,

poemojn kaj kanzonojn. Mi admiras lin ankaŭ pro lia majstra regado de vortludoj pensigantaj pri *Raymond SCHWARTZ* kaj de vortfaroj laŭ propraj – sed kelkfoje Zamenhofaj – reguloj. Tiuj du karakterizoj kreas gravajn malfacilaĵojn al iu tradukanto... Malfacilaĵoj kiuj defie instigis min traduki lian romanon “*L’Ecume des Jours*” – en broŝuretoj aperigitaj kun la tiama revuo “*Franca Esperantisto*” –, kaj

el kiuj restas eble kelkaj ekzempleroj en la kelo de “Espéranto-France”!

“*L’Ecume des Jours*” estas ja “la plej emocia el la nuntempaj amromanoj” laŭ *Raymond QUENEAU*.

Cetere *Raymond QUENEAU* certe estas multege pli kapabla ol mi por difini ĉiujn ecojn kaj meritojn de *Boris VIAN*... Mi lasas al li la parolon...

Claude LONGUE-ÉPÉE

Boris Vian estas viro bone klerigita kaj bone edukita, li estas studinta en “Centra Lernejo”.

Tio ne estas nenio, sed tio ne estas ĉio.

Boris Vian per “trumpineto” muzikludis kiel neniu alia;

li estis unu el la renovigontoj de la “keloj” en Francio;

li pripledis la Nov-Orleanan stilon.

Sed tio ne estas ĉio.

Boris Vian pripledis ankaŭ bi-bop-on.

Sed tio ne estas ĉio.

Boris Vian pripledis ankaŭ sin mem antaŭ homa juĝantaro, pro sia verkado

de “Mi iros surkraĉi viajn tombojn” kun subskribo de Vernon Sullivan.

Sed tio ne estas ĉio.

Boris Vian verkis tri aliajn pseŭdoepigrafojn.

Sed tio ne estas ĉio.

Boris Vian tradukis ververajn usonajn verkojn absolute aŭtentikajn, kaj eĉ kun lingvaj malfacilaĵoj apenaŭ kredeblaj.

Sed tio ne estas ĉio.

Boris Vian verkis teatraĵojn: “Bestkadavrejo por ĉiuj”, kiu estis ludita de veraj aktoroj, sur vera scenejo, malgraŭ ĝia intence intensa provokemo.*

Sed tio ne estas ĉio.

*Boris Vian estas unu el la fondintoj de unu el la plej sekretaj Parizaj societoj, la “Klubo de l’Sciencaventuristoj**”.*

Sed tio ne estas ĉio.

Boris Vian verkis belajn librojn, strangegajn kaj kortuŝegajn; “La ŝaŭmo de l’tagoj” estas la plej emocianta el la nuntempaj amromanoj; “La formikoj” estas la plej permitanta el la noveloj verkitaj pri la milito; “La aŭtuno en Pekino” estas verko malfacila kaj ne konata.

Sed tio ne estas ĉio.

Ĉar ĉio tio nenio estas;

Boris Vian estas estiĝonta Boris Vian.

El *Raymond QUENEAU*

NOTOJ de Claude LONGUE-ÉPÉE

* En la franca originalo, *Raymond QUENEAU* skribis: “...pourtant il n’y était pas allé avec le dos de la Q.I.R. ...”

** Tiu kiu povas en Esperanto taŭge esprimi la vortfaradon kaj la vorten-havon de la “franca” “Savanturier” bonvolu sin konigi al mi (eble eks-membro de tiu eminenta rondo?).

Eŭropa armita forto. Uzado de la angla lingvo ?

Estas nuntempe interesa debato stariĝinta en la retlisto "reago.fr", en kiu certe pluraj el niaj legantoj partoprenas. Temas pri reagoj al la aserto de iu altranga franca generalo, *Christian BAPTISTE*, kiu rekomendas, por bona kaj reale efika komunikado inter la germanaj kaj la francaj armeoj en

siaj rilatoj kaj agadoj, ke ĉi-tiuj uzu komune la anglan lingvon. Tio memorigis al mi leteron, kiun mi sendis en Septembro 2001 – kiel vicprezidanto de "Espéranto-France" taskita pri la eksteraj rilatoj – al *Alain RICHARD*, la tiama ministro pri la Nacia Defendo.

Jen la teksto de tiu letero... kiun sekvis eĉ ne banala ricevatestilo... Kaj – kompreneble – ankaŭ ne iuspeca dekreto pri komuna lingvo inter la du armeoj.

Claude *LONGUE-ÉPÉE*

Al: Sinjoro *Alain RICHARD*, Ministro pri la Nacia Defendo.
Pri: Eŭropa Armita Forto. Uzado de la angla lingvo.
En Parizo, je la 3-a de Septembro 2001.

Sinjoro Ministro,

La esperantista movado celas, en ĉiuj siaj agadoj, obstinan humanisman serĉadon al la Paco inter la homoj kaj la popoloj. Klopodojn esence pacemajn kaj neperfortajn ĝi rekomendas kaj pristrebos.

Kompreneble, la francaj kaj eŭropaj esperantoparolantoj konscias pri la neceso de armilaro certiganta la sendependecon de Eŭropo kaj ĝian efikecon por la defendo de ĝia teritorio, de ĝiaj ideoj kaj de ĝiaj decidoj. Zorgante pri la eŭropa unueco, en la diverseco de ĝiaj kulturoj kaj de ĝiaj lingvoj, la francaj kaj eŭropaj esperantoparolantoj aprobas la organizadon de iu "Eŭropa Armita Forto", kiu federu la trupunuojn de la membroŝtatoj, kaj kies unu el la iniciatantoj vi estas.

En nia asocio "Espéranto-France" ni estas certe malkompetentaj prijuĝi la kondiĉojn de strukturado de tiu "Eŭropa Armita Forto". Sed ni ne dubas, ke ĉiumaniere ĉiuj viaj klopodoj subiĝas sub triobla zorgo: pri la sendependeco de la Armita Forto antaŭ la ekstero; pri la efikeco de ĝia interna komunikado; pri la sekureco de ĝia anaro.

Tamen, ni emas kontesti la taŭgecon de via elekto trudi ene de la armeoj, kaj praktiki en ties interkomunikadoj, la nuran uzadon de la angla lingvo. Kaj ni nin demandas, ĉu ne estus pli praktike kaj oportune konsideri la banaligon, kaj ĉiuokaze la antaŭan eksperimenton, en la "Eŭropa Armita Forto", de lingvo kia Esperanto pro ĝia lernfacileco, ĝia neŭtraleco kaj ĝia adaptiĝkapablo.

Pri la zorgo al sendependeco.

Kial trudi la uzon de nacia lingvo, kies parolantaro ne estas la plejmulto en Eŭropo? Se temas pri iu atento al amikecaj kaj aliancaj ligiloj kun la usona demokratio, ĉu ni ne devas submetiĝi sub ĝia fakta dependeco kaj obei ĝiajn decidojn kaj ordonojn?

Esperanto estas neniel suspekta esti ilo de iu nacio aŭ de iu ŝtato. Ĝi estas neniel suspekta havi hegemonian volon.

Pri la zorgo al efikeco.

La angla estas malfacila lingvo. Ĉu ni volas, ke la lingvo de la "Eŭropa Armita Forto" estu elita ilo rezervita por superaj oficiroj alilande profitintaj multekostajn staĝojn en iu civila medio aŭ tendencajn staĝojn en iu fremda armeo?

Esperanto estas finlernebla dekfoje pli rapide ol la angla; kaj ĝi estas atingebla de ĉiu ajn civitano posedanta iun ajn lernejan instruon. Ĝiaj fundamentaj principoj igas ĝin senprobleme adaptebla al la rapida evoluo de la moderna mondo kaj al ĉiuj ties teknikoj.

Pri la zorgo al sekureco.

Ĉu ni forgesis la aviadajn akcidentojn kaŭzitajn de miskompreno de la angla inter pilotoj kaj aerkontrolistoj?

Esperanto estas parolata tra la mondo kun la sama akĉento, la samaj frazarangoj (kaj eĉ la samaj idiotismoj!). Sufiĉas ĉeesti internacian kunsidon de esperantoparolantoj, por konstati la homogenecon de la lingvo kaj la facilecon de la komunikado. Ĉu ni povus diri la samon pri kolokvoj en la angla?

La instruado kaj la banaligado de Esperanto en iu komuna eŭropa forto ne estas utopio.

Krome, Esperanto havas pruvitan propedeŭtikecon, kiu ŝatatis kaj faciligas la lernadon de aliaj fremdaj lingvoj.

Esperanto certe ne estas nun instruata en la diversaj eŭropaj armeoj. Ankaŭ la metrosistemo ne estis aŭtomate alprenita de ĉiuj ŝtatoj. Povus esti de Francio la honoro montri la vojon kaj iniciati sistemon taŭgan al ververa Forto de Paco.

Estus agrable al ni koni vian reagon al niaj diraĵoj, kaj se eble esti invitataj al renkontiĝo, por ke ni povu respondi la demandojn, kiujn vi bonvolos starigi. Kun niaj respektplenaj sentoj.

En la franca redaktis,
kaj al Esperanto tradukis
Claude **LONGUE-EPÉE**

Kulturo

La kanto de la maizo

Ĉe la Hopi-Indianoj, popolo vivanta en la aridaj *Arizona* kaj Nov-Meksika regionoj (hopi ilialingve signifas pacema), mitologia persono nomiĝanta *Kokopelli* asociiĝas kun fekundeco kaj ĝermado. La aliaj Indianaj popoloj konas lin, kiel la "ĝiban flutludanton". Lia senkompara silueto estas priskribita, laŭflue de la jarcentoj, sur multaj ŝtonoj kaj potaĵoj de la du Amerikoj. Laŭ ili, lia ĝibo estas sako de semoj kiujn li disjetas ĉiufanken. La kapo de *Kokopelli* estas kovrita per kosmaj antenoj, kiuj ebligas ĝin kapti la kanton de la steloj por enblovi tiun kanton en la Vivoplenajn Semojn, Steloplenajn Semojn, kiuj fekundigas la Tero-Patrinon. Koncerne lian fluton, ĝi estas la fonto de la enblovita spirito en ĉiun el la grajnoj.

Fronte al la detruaj fortoj, kiuj nuntempe senbridiĝas sur la planedo, la simbolo *Kokopelli* reprezentas por ni la esperon de Tero denove fekunda, kaj de Vivoplenaj Semoj.

Jen la rakonto de la etnobotanikisto *John KIMNEY*, gastigita de *David MONONGYE*, religia estro kaj saĝulo de la Hopi-tribo:

Dum Julio, antaŭ pluraj jaroj, mi estis invitita dum kvar semajnoj en *Third-Mesa*, en la Hopi-lando. Jam de tri semajnoj ne pluvis, kaj la grundoj sekiĝis pro la influo de la varmeĝo. Estis tagmeze, kaj mia gastiganto, en la freŝeco de sia ŝtona domo, kviete duonendormiĝis. Ne eblis al mi resti senmova. Mi malforte fermis la moskitvualan pordon malantaŭ mi,

kaj mi enprofundiĝis en la varmecon de la *kisnovi*, la vilaĝa placo. Mi elrigardis por malkovri iun movon, sed ĉio estis kvieta, kvazaŭ estus noktomeze. Nur hundo moviĝis por ne perdi iom da tagmeza ombro. Ŝajne, la cetero de la vilaĝo respektis la ritaron de la profunda siesto, kiun *Tawa* (taŭa), la Patro-Suno, trudas ĉiutage al ili. "Nur la frenezaj hundoj kaj la *Angloj sub la tagmeza suno*", mi murmuris, revemtone. Mi eĉ ne sciiis, kien mi iras, malsuprenirante laŭ la bordo de la mesa (altebenaĵo) sur pado, kiu estis, jam delonge, kvazaŭ pikpikita en la molaj rokoj, dum pli freŝaj tagoj.

Kiam mi atingis la klifan malsupron, mi vidis lacerton, kiu haste enŝoviĝis sur polvoza vojeto. Tiam, mi sekvis ĝin, kvazaŭ tiu kreitaĵo gvidus min.

Post proksimume kvaron-hora marŝado, la pado aliris subite norden, ĉirkaŭ amaso da disfalaĵoj. Antaŭ ol mi kapablis vidi aliflanke de la rokoj, mi aŭdis malfortan kantantan voĉon. Mi malrapidigis mian paŝadon, kaj provis rigardi. Antaŭ mi troviĝis vastajo de maizo, la plej vasta, kiun mi iam povus admiri en tiu regiono. Ĝi estis tiel granda, ke ĝi ne ŝajnis povi esti Hopi. Mi ankoraŭ ne vidis iun, sed la kanto fariĝis pli klara. Mi divenis, ke temas pri la dolĉa kaj laŭtega voĉo de maljunulo. Sed kie li estis? Mi atendis ankoraŭ kelkajn minutojn, aŭskultante tiun kantantan kampon de maizo. Kaj subite, el la verdaj maizaj tufoj blanka kapo aperis, kiu, laŭflue de la maizvicoj, malrapide moviĝis senĉese kantante.

Mi ekkonsciis subite pri tio, kion miaj okuloj vidis. Tiu kampo de maizo, pleneze de la somero, estis belega kaj superabunda. Ĉirkaŭ dekduo da spikoj maturiĝis en ĉiu tufo, kaj rapida taksado indikis al mi, ke tie troviĝas verŝajne 1200 tufoj de maizaj plantoj. La grundo estis seka kaj pergameneca sekve de longdaŭraj periodoj de sekeco, kaj tamen, la maizo apenaŭ montris velkosignojn, male de la aliaj kampoj, kiujn mi estis observinta ĉirkaŭe de la vilaĝo. La plendoj, kiujn mi aŭdis de la farmistoj, kiuj vivis apud la domo, kie mi loĝis, pripensis min, ke la tuta maizo malfortiĝis pro manko de akvo. Tamen, ŝajnis al mi, ke tiu kampo ĵus ricevis benitan pluvon! Mi kviete denove supreniris la vojon kondukantan al la vilaĝo, nevidate de la maljunulo. Mia gasto estis nedorm-

anta, kaj demandis de kie mi revenas. Kiam mi klarigis al li, kion mi vidis kaj aŭdis, la intereso, kiun li montris rilate miajn vagadojn, transformiĝis en amuzatan rideton.

– Mi konstatas, ke vi trovis la kampon de *Tituso*, li diris, eligante dampitan rideton.

– Sed kial tiu kampo estas tiel splenda? Ĉu ĝi posedas sekretan akvofonton?

Avo nur ridis.

– Kompreneble ne. Sed ĝi entenas *Navoti*.

– Kio estas tio? mi demandis, opinianta ke eble ekzistas sekreta fekundigilo atingebla nur de kelkaj klanoj.

– Li posedas la Hopi-vojon, klarigis al mi *Avo*, post pensema paŭzo. Li konas la malnovajn kantojn, kiuj freŝigas siajn maizo-infanojn. Li senerece recitas siajn preĝojn dum la semado. Kaj, kio plej gravas ol ĉio, li scias, ke ne necesas maltrankviliĝi, ĉar anksio malutilas al plantoj same kiel sekeco. Prefere ol angori, kio nervozigus liajn infanojn, li iras al ili en la varmece de la tago, kaj li kantas al ili la malnovajn kantojn, kiuj estas por liaj infanoj, fonto de kuraĝo.

– Sed, *Avo*, la aliaj homoj certe rimarkis la diferencojn de lia maizo. Kial ili ne lernas liajn kantojn, kaj kial ili ne kantas por sia maizo?

Mia maljuna mastro Hopi suspiris.

– Tio ne utilas. *Navoti* ne plu vivas en la semoj de la aliuloj.

Fine de tiu grava monato pasigita sur la mesa, mi veturis aŭtomobile al la nordo, laŭirante la valon de *Rio Grande*, por atingi *Taos*, la urbon, en

kiu mi loĝis. Dum mi traveturis ĉiun el la dek naŭ *pueblos* (vilaĝoj), mi travivis kvazaŭ alvokon. Mi konstatis, eble unuafoje, kiel malmulte la malnovaj kulturoj estis uzataj, eĉ la luzerno. Ŝajnis al mi, ke la semoj vokas min. Mi ekkonsciis, ke la fonto de la povo, kiun mi spertis, estas enkaptita en la semŝirmejoj, en la argilpotoj, en la kafskatoloj kaj en la siteloj ordigitaj en la mallumaj anguloj; ĝi troviĝis ankaŭ en la malnovaj tapiŝoj el plektitaj maizoj. La grajnoj, kiuj vokis min, estis malnovaj grajnoj, rikoltitaj antaŭ la estiĝo de la supermarktoj, antaŭ la uzado de la saketoj el aluminio, kiujn oni trovas sur la bretaro de la butikoj, komence de ĉiu printempo. Ili estis la grajnoj pri kiuj *Avo* rakontis al mi, tiuj, kiuj ankoraŭ posedas la *Navoti-n* de la pasintaj aĝoj. Ĉirkaŭ kvindek jarojn poste, ilia vivoforto estas sendifekta. La seka klimato de la altaj ebenaj favoris la konservadon de iama povo, kiu vivis en la epoko, kiam la homoj kantis por siaj plantoj. Al mi tiuj semoj direktis nun siajn kantojn, kun la espero esti aŭdataj antaŭ ol malaperi definitive en la forgeson.

Eltirajo de la verko publikigita far *Seed Savers Exchange*:
“*The first ten years*” – 1986

Franca traduko de *Dominique GUILLET*

Esperantigita fare de la grupo de *Valenciennes*, kun la helpo de S-ino *Jackie Huberdeau* el la grupo de *Le Mans* (Francio), laŭ la propono de *MO* (Belgio).

La franca asocio Kokopelli, tutmonde aktiva, protektas la biodiversecon. Ĝi vendas kaj donas grajnoj de malnovaj specoj.



Por pliaj informoj.

★ En Francio:

Oasis

131 impasse des Palmiers

30100 Alès

Tel. 00 33 (0)4 66 30 64 91

aŭ Tel. 00 33 (0)4 66 30 00 55

www.kokopelli.asso.fr

★ En Belgio:

Terre potagère –

Semences de Kokopelli

Isabelle et Roland Devaux

1 rue Fontena – 5374 Maffex

Tel. 00 32 (0)86 32 31 72

www.kokopelli-be.com

Koncize Mallongaĵoj

Por la vojaĝemuloj

En sia nova eldono, la Pasporta Servo de TEJO enlistigis 1 087 adresojn en 90 landoj. En Francio estas 169 gastigantoj en 91 urboj.

Aŭstraliaj kaj germanaj dolĉaĵoj



ARTURALIAJ KAJ GERMANAJ DOLĜAĴOJ (Idelaida/ Herzberg, 2010/2011).

Profesia terminologio

Nur deko da homoj en la mondo kapablas profesinivele interpreti universitatatajn prelegojn al kaj el Esperanto. Krome, konstatas C. **HURSTEL**, la nunaj terminaroj estas nek sufiĉe ampleksaj nek sufiĉe ligitaj al la ĉiutaga uzo de la lingvo.

Partopreno en kongreso

"Kongresaj notoj: Rete partopreni neniel malutilas al la surloka sukceso de kongresoj, male. Reta elsendo ebligis partoprenon al homoj fizike malproksimaj; sed ĉefe instigu emon al fizika ĉeesto en estontaj kongresoj." (TdB)

"Vi bone scias, ke Universala Kongreso, daŭrante nur unu semajnon, ne donas la eblon sufiĉe profunde koni homojn el aliaj kontinentoj. Konversacioj de Eŭropanoj kun ĉinoj, se ili entute okazas dum U.K., daŭras ofte nur kelkajn minutojn." (RC)

Jubilea festo

En *La Chaux-de-Fonds* (Svislando) gemamikoj el 10 nacioj festis la okdek-jaran naskiĝtagon de **Claude GACOND**. Raportis radio-elsendejo kaj gazetaro (i.a. tuta paĝo en la ĵurnalo *"L'Impartial"*). Honore al la multflanka pedagogo aperis festlibro kun kontribuoj de 20 fakuloj: *"Instrui, dokumenti, organizi"* (eld. **Ittis**). Kelkaj ĵurnalistaj demandoj

(dulingvaj): "S-ro **GACOND**, kiom vi aĝas? Kiel vi fartas? Ekde kiam vi scipovas Esperanton?... »

Dudekmil

En Kortrejko (B) la Esperanto-fondajo **VANBIERVLIET** arigis jam ĉ. 10 000 librojn kaj 10 000 jar-kolektojn. Iu mankolisto temas pri mankantaj revunumeroj kaj gazet-numeroj.

Urba biblioteko /

Esperanto
Leiestraat 30
BE-8500 Kortrijk

Klasikaj francaj verkoj

En Esperanto eldonitaj de *"Espéranto-France"*. Kolekto havebla por interesatoj.

Trevor STEELE

Post sia veno en Lille, **Trevor STEELE**, pedagogo kaj aŭtoro de 12 libroj en Esperanto, prelegis en 6 aliaj francaj urboj.

Ward, 2-a jarcento

410-paĝa libro de **F. WERST** (Eld. **Seuil**). Por krei apartan etoson, la verkisto aldonis gramatikon kaj ampleksan leksikon pri imagata pralingvo kun tre detalaj klarigoj kaj ekzemploj. Tamen tute ne temis pri Esperanto aŭ "moderna" lingvo.

« Nia trezoro »

Ĉiumonata kroniko de la revuo **"La Ondo de Esperanto"** aperigis jam artikolojn pri la historio kaj kulturo de Esperanto. La tekstoj eldoniĝis libroforme "Dek libroj kaj dek gazetoj". Sekvos kolektoj pri originalaj romanoj kaj ĉefaj eldonejoj. (Kunlabore kun Litova Esperanto-Asocio).

El ĵurnalo "Nord Éclair"

Artikolo siatempe tradukita de **L. BOURGOIS**, laŭ la franca originalo:

Sauvés... par l'espéranto!

"Un lecteur de Noyelles-sous-Lens

(P.-d.-C.) nous envoie le dramatique récit d'une aventure qui lui est arrivée en 1940. Considérant que cet épisode tragique se passe de commentaires, nous lui laissons la parole.

La 21-an de Majo 1940, mi estis en Aubigny-en-Artois en la momento kiam alvenis la germanaj soldatoj en tiu urbeto. La morgaŭan matenon, ili arestis min kaj multajn civilulojn. Ni devis alĝuiĝi kontraŭ la muro kun levitaj brakoj. Apud mi staris belga esperantisto kaj Alĝeriano. Ni interŝanĝis kelkajn vortojn en Esperanto, kiam subite germana sentinelo alproksimiĝis kaj demandis esperantlingve, – Ĉu vi estas esperantistoj? – Jes!

– Nu, tiukaze, mi helpos vin forkuri, ĉar ĉiuj homoj ĉi-tie kunigitaj estas mortpafotaj! Li malproksimiĝis kaj, post paso de ĉirkaŭ unu horo, dum oni frapis viron, kiu estis mallevinta la brakojn, mi sentis, ke iu tiras min malantaŭen. Mi turnis la kapon kaj rekonis la germanan soldaton, kvankam li estis demetinta sian kaskon. Li mansignis al nia triopo, ke ni lasu nin fali kaj ni tuj poste rampis ĝis la najbaraj domoj. Ni dankis nian savinton kaj forkuris sur la kamparo. Ni poste eksciis, ke tiun posttagmezon 98 civiluloj estis mortpafitaj."

Notoj de **Lucien GILLOTEAUX**

Atentigo de la redaktoro

Mi volas atentigi al la legantoj de nia gazeto, ke:

- Estas eldonotaj ĉiujare tri numeroj :
Komence de Januaro (jarkomenciĝo, listo de niaj kursoj, membroaliĝiloj, raporto pri la staĝo en *Stella-Plage*);
- Komence de Junio (finiĝo de la lernoĵaro, preparo de la ekzamen-sesio);
- Komence de Oktobro (raportoj pri kongresoj, preparo de la kursoj).

Mi volas atentigi al la redaktontoj de artikoloj, ke:

- Iliaj artikoloj estas ĉiam bonvenaj kaj alte taksataj;
- Ili estu sendotaj al la redaktoro plej malfrue tri semajnojn antaŭ sia aperigo (30-a de Novembro, 30-a

de Aprilo, 30-a de Aŭgusto). Tiu tempodaŭro estas necesa por la korektdado, enpaĝigo, presado kaj sendado.

Mi volas atentigi al la legantoj de nia gazeto, ke:

- Ni atendas de ili rimarkojn, kritikojn, sugestojn pri la eldonitaj – kaj eldonotaj – artikoloj, pri la temoj pritraktataj kaj ankaŭ pri la vivo kaj la eventoj de niaj grupoj.

Mi volas atentigi al la “freŝbakitaj” samideanoj nove diplomitaj, ke:

- Ni alte taksas ricevi iliajn artikolojn, pri iu ajn temo, kaj eĉ se tiuj artikoloj estas tre mallongaj (aŭ tre longaj).

Mi volas atentigi al ĉiuj legantoj de la

gazeto (federaciaĵoj aŭ ne), ke:

Ili trovu ĉi-ene kunmetitan ekzemplon – kiun ili povas fotokopii kaj multobliki – de la teksto de Peticio por “Esperanto kiel laŭvola opcio en Bakalaŭro”. Ili jam aŭdis paroli pri tiu peticio – aparte okaze de la semajnfino en *Stella-Maris*.

Pluraj politikistoj, parlamentanoj, lokaj kaj regionaj reprezentantoj de nia regiono estis jam de mi kontaktitaj kaj subskribis.

Mi forte instigas vin rikolti en viaj medioj, ĉe viaj amikoj kaj familianoj kiel eble plej multe da subskriboj kaj sendi la foliojn al la indikita adreso.

Claude **LONGUE-ÉPÉE**

Asociaj kaj redakciaj informoj

FÉDÉRATION ESPÉRANTO NORD

Prezidanto (eldona direktoro de la gazeto):

Arlette PLUTNIAK

22 rue d'Arras 62123 SIMENCOURT

Tel : 03 21 55 61 35

eplutniak@esperanto-nord.org

Federacia retejo:

http://www.esperanto-nord.org

Sekretario:

Katja BOEN

51 Avenue du Maréchal Leclerc

59130 LAMBERSART

Tel : 03 20 92 31 36

cboen@esperanto-nord.org

Tarifo de kotizoj:

13 € por plenkreskulo, 8 € por junulo, studento, senlaborulo.

Per ĉeko al la ordo de “Fédération Espéranto-Nord” sendota al la kasisto:

Xavier VILAIN

Résidence L'Alcyon – Apt. 41

90 rue du Maréchal Joffre

59240 Dunkerque

Tel. 06 70 65 93 29

xvilain@esperanto-nord.org

BULTENO “NORDA GAZETO”

Ĉefredaktoro:

Claude Longue-Épée

320 rue des 4 Bons Dieux

59235 BERSÉE

Tel. 03 20 59 28 80

plongueepee@free.fr

Konstantaj korespondantoj:

★ **Amiens**

Cyrille DÉCOUTURE

prezidanto@esperanto80.org

★ **Arras**

Jean HENNEBERT

jhennebert@esperanto-nord.org

★ **Boulogne**

Marie-Jeanne LINÉ

mjline@esperanto-nord.org

★ **Dunkerque**

Elise DEPLA

edepla@orange.fr

★ **Lille-Villeneuve**

Katja BOEN

cboen@esperanto-nord.org

★ **Valenciennes**

Jean-Marc FRATARD

jmfartard@esperanto-nord.org

Enpaĝigado:

Cyrille DÉCOUTURE

10 chemin des Oiseaux

76270 FESQUES

prezidanto@esperanto80.org

Tel: 06 78 80 78 45

Kontrolantoj-korektantoj:

Claude Longue-Épée

plongueepee@free.fr

Pascal VILAIN

p.vilain83@orange.fr

Presado, enkovertigo, sendado:

Richard VALET

Rue du Boulenriez 59235 BERSÉE

rf.valet@wanadoo.fr

La tekstoj de artikoloj estu sendotaj antaŭ la 30-a de Aprilo 2012.

Partoprenis je tiu ĉi numero

Richard VALET, Jean HENNEBERT, Nicole BÉCANT, Hélène MAZZEGA (kun Hélène Chantal WLODARSKI, Nicole BÉCANT kaj Arlette PLUTNIAK), Marie-Jeanne LINÉ, Cyrille DÉCOUTURE, Daniel DEVIS (kun teksto de Lora DEBRAY, Camille MARTIN, Amandine LAMORY, Morgane CARETTE kaj Lia BENS), Daniel DAVID, Xavier VILAIN, Claude LONGUE-ÉPÉE, Michel DECHY, Jean-Marc FRATARD, Marcel DELFORGE, Irène BUNNET, Dominique GUILLET (kaj la grupo de Valenciennes, kun la helpo de S-ino Jackie HUBERDEAU el la grupo de *Le Mans*), Lucien GILLOTEAUX kaj Pascal VILAIN.